



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Novembro 2016 n-ro: 11



## Merhaba!

Bir yaz daha bitti, okullar açıldı, kış gelmek üzere ve biz de 11. sayımızla karşınızdayız.

Bu sayımızda önemli okuma parçalarından birisi "Kolektanto de ĉielarkoj". Bu çok bilinmeyen kelimesi olan ancak basit hikayeyi kesinlikle okumalısınız. Renato Corsetti ve Anna Löwenstein'in yazıları da okunmaya değer yazılar. Şiir köşesinde sizlere Esperanto dilinde haiku'lar ile tanıştırıyoruz. İranlı arkadaşımız Sacad Daşti'nin "1001 Gece Masalları"ndan tercüme ettiği "fare ile samur"un hikayesi kolay okunabilecek başka bir yazı. Kısa felsefe tarihine ise Makyavel ile yani çok önemli başka bir filozof ile devam ediyoruz.

Yaklaşmakta olan kış günlerinde hepinize,

## İyi okumalar...

## Saluton!

Somero finiĝis, lernejoj malfermiĝis, vintro preskaŭ alvenis, kaj ni prezentas al vi nian 11-an numeron.

El la prej gravaj legaĵoj en ĉi tiu numero estas la rakonto "Kolektanto de ĉielarkoj". La rakonto havas multajn nekonatajn vortojn sed ĝi estas facile legebla. La verkaĵoj de Renato Corsetti kaj Anna Löwenstein estas legindaj. En nia angulo de poemoj ni konigas a vi la poemetojn hajkojn verkitajn en Esperanto lingvo. Nia irana amiko Saĝad Daŝti tradukis rakonteton el la "1001 Noktoj" kiu estas facila kaj leginda. Nia mallonga historio de filozofio daŭras kun Makiavelo kiu estas alia tre grava filozofa.

Do, en la alproksimiĝantaj vintraj tagoj ni deziras al ĉiuj de vi,

## Bonan legadon...



## TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Saluton	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Junulara renkontiĝo en Kreto	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Kolektanto de ĉielarkoj	4
Kiu kontinento estas pli oportuna por informado pri Esperanto?	6
Kial mi lernis Esperanton?	8
Vivlonga metodo inventita de rusa sciencisto	8
Lingvoj kaj pensado	9
Brita ekziĝo el EU kaj Esperanto	9
Dankon onklo Julius	10
La junaj detektivoj (6)	11
Nia trezoro: Kalocsay, masonisto de Parnaso	13
Hajkoj de Elena Popova	14
Ŝercoj	15
Kruĉvort-enigmo	15
Doĝrudan metod ile Esperanto	16
La rakonto de la muso kaj zibelo	18
Mallonga historio de filozofio (12)	19
Malnovaj grekaj mitoj: Edipo kaj Antigona (1)	20
Kuriu kun mi	23
El la libro de Dao De Jing (4)	24
Aŭskultu Radiojn	24
Esperanto Kursu (11)	25
Malfermo	28

## Kursoj



### 1) Kurso en la Lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbul.

La kurso komencis sub la gvidado de Murat Ŭzdizdar. Estas kvar lernantoj, unu komencanto, unu progresanto, kaj du instuirstoj (de la hispana kaj franca lingvoj) kiujsekvas la kurson

### 2) Kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto.

Pro manko de interesiĝantoj momente ne estas kurso.

### 3) Kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato en Manisa urbo.

Utku Gürdal la gvidanto okupiĝas pri sia disertacio, kaj momente estas neniu interesiĝanto por la kurso.



De la tempoj de la grekaj mitoj, kiam Teseo mortigis la virbovon, nenio rimarkinda okazis en Kreto ĝis nun. Sed nun okazas io alia mita: junulara renkontiĝo de dek junaj esperantistoj (de 0 ĝis 35 jaroj), kiuj de la 13-a ĝis la 20-a de aprilo 2017 kunvenos en la Esperanto-domo de Annie Grente en Neapoli, malgranda urbo en Kreto. Oni devos pagi nur 5 eurojn ĉiutage por la manĝo.

Kondiĉoj:

- \* ne pli ol 10 homoj
- \* kun malsamaj lingvoj
- \* progresantoj sed NE TRO SPERTAJ parolantoj de Esperanto

Por vidi, ĉu vi sukcesos eniri ĉi tiun labirinton, skribu al "Annie Grente" <[anniegrente@hotmail.fr](mailto:anniegrente@hotmail.fr)>.

## LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Ok respondoj de prezidanto Fettes  
Mezŝirpa Interreligia Forumo en Nitro  
Eŝtriga itala kongreso  
Esperanto en la pola Woodstock  
Opiniis de legantoj de "La Ondo" pri la estonteco de nia gazeto  
Parolu Esperanton kun samlandanoj: Alvoko de Trezoro Huang Yinbao  
Kio estas "Amikuma"  
Nia Trezoro: Esperanto-urbo Herzberg am Harz  
Nova rakonto de Julian Modest



2016 10

### La Ondo de Esperanto

Legu la prezenton de la oktobra kajero de "La Ondo de Esperanto".  
<http://sezonoj.ru/2016/10/ondo-14/>

## Ni atendas leterojn de geamikojn

### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!



Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

## Esperanto-Sumoo



Aperis rezulto de la Septembra Esperanto-Sumoo 2016!

Legu pli ĉe:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/septembro2016.html>

### Pacmesaĝoj tra la mondo

Hori Jasuo eldonis libron titolitan "Pacmesaĝoj tra la mondo".

Bonvolu legu pli ĉe:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/images/pacmesagxoj.pdf>

Dum UK-oj kaj Azia Kongreso kaj pere de Delegita Reto, Jasuo kolektis 166 pacajn mesaĝojn el 56 landoj. Li faris libron pri tiuj mesaĝoj kun belaj fotoj. Dankante al la mesaĝdonintoj li atendas viajn mendojn.

Aŭskultu raporton pri la sumoo-kunsido dum la UK en Nitra, kompilita de s-ino YU, Ĉina Radio Internacia:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/images/kunsido.mp3>

La novembra Esperanto-Sumoo okazos ekde la 13-a ĝis la 27-a de novembro 2016.

**NE FORGESU ALIĜI !**

Jen ligilo por la retejo de la Esperanto-Sumoo:

**http:**

[//www.esperantosumoo.strefa.pl/index.html](http://www.esperantosumoo.strefa.pl/index.html)

Jen ligilo por la facebook-grupo Esperanto-Sumoo:

**https:**

[//eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

## UEA



N-ro 635 (2016-09-15)

**Forpasis Magda Ŝaturová (1929-2016)**

La meritplena

slovaka esperantistino Magda Ŝaturová-Seppová forpasis la 10-an de septembro en Bratislavo. Ŝi naskiĝis la 4-an de julio 1929. Studinte la anglan filologion kaj doktoriĝinte en 1953 ŝi laboris kiel eldonredaktoro, unue ĉe belliteratura eldonejo kaj poste ĉe Slovaka Pedagogia Eldonejo (1955-1987).

Legu pli ĉe:

[http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Forpasis-Magda-%C5%A0aturov%C3%A1-\(1929-2016\)](http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Forpasis-Magda-%C5%A0aturov%C3%A1-(1929-2016))

N-ro 636 (2016-09-26)

**Konkurso por nova Esperanto.net**

UEA lanĉas konkurson por la renovigo de Esperanto.net kun premio de 3 000 EUR. Se vi fakas pri retejo-kreado, prezentu vian proponon pri la nova retejo por montri Esperanton kiel ni fieras pri ĝi: moderna ideo, alloga lingvo.

Legu pli ĉe:

<http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Konkurso-por-nova-Esperanto-net>

N-ro 637 (2016-10-03)

**Malferma Tago la 26-an de novembro**

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas por la 45-a fojo al la Malferma Tago, kiu okazos sabaton, la 26-an de novembro 2016, kaj tuj poste, dimanĉe, la 27-an de novembro, okazos seminario pri informado.

Legu pli ĉe:

<http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Malferma-Tago-la-26-an-de-novembro>

## TEJO



**Tradukantoj serĉataj**

Ĉu vi ŝatus havi ĉi tiun retpaĝon en

via lingvo? Jen ebleco por vi - ĝuste nun ni serĉas tradukantojn por tejo.org al ĉiuj lingvoj....

Legu pli ĉe:

<http://tejo.org/blog/2015/03/13/sercataj-tradukantoj-tejo-org/>

### Malferma alvoko: TEJO dungas video-kreanton

Moderna mondo rapide ŝanĝiĝas kaj Esperanta movado devas adaptiĝi. Tial TEJO pliprogresigas sian agadon varbante per moderna informperilo – video – kaj dungas video-kreanton por 2 monatoj. Ĉu temas pri vi? Kandidatiĝu ĝis la 10a de oktobro 2016....

Legu pli ĉe:

<http://tejo.org/blog/2016/09/30/malferma-alvoko-tejo-dungas-video-kreanton/>

### Homo de spertoj: Francesco Maurelli, nova Komitatano Ĉ

Francesco Maurelli nuntempe estas tre feliĉa homo. Freŝe reveninte de sia nuptovojaĝo, ni kaptis lin por intervjueto pri sia plej nova kaj ĝoja rolo en la vivo: komitataneco Ĉ....

Legu pli ĉe:

<http://tejo.org/blog/2016/09/30/homo-de-spertoj-francesco-maurelli-nova-komitatano-c/>

### Arina en Afriko! (parto unu)

Ĵaŭde je la 7a matene forflugas la Ĝenerala Sekretario de #TEJO, Arina Osipova al Afriko. Kial? Pri tio mi demandis ŝin....

Legu pli ĉe:

<http://tejo.org/blog/2016/09/27/arina-en-afriko-parto-unu/>





**KARAJ SAMIDEANOJ:**  
*Memoru, ke por fariĝi flujaj kaj lertaj parolantoj de Esperanto estas nepre necese elmeti nian orelon al la sonoj kaj dirmanieroj de la parolata lingvo kiel eble plej ofte, kaj ĝuste la ĉefa celo de niaj podkastoĵoj ĉe SoundCloud*  
<https://soundcloud.com/luis-jorge-santos-morales>

*estas helpi vin pliriĉigi kaj vian Esperantan aŭdkomprenivon kaj vian parolfluecon.*

**Luis Jorge Santos Morales**

## KOLEKTANTO DE ĈIELARKOJ

La atmosfero en la triaklasa kupeo estis sufoka. Ŝvitodoro ŝvebis en la aero.

Kun malŝato mi pensis pri la multaj horoj de vojaĝo, kiuj ankoraŭ staris antaŭ mi. Miaj kunvojaĝantoj vigle babilis pri temoj, kiuj eĉ ne por momento, povis fiksi mian antenton.

Vidalvide de mi, ĉe la kontraŭa flanko de la fenestro, sidis dekjara nigrokula knabino. Sur ŝia vizaĝo ŝajnis al mi diveni la saman enuon, kiun mi mem sentis.

Mi decidis alparoli ŝin.

Responde al miaj demandoj Sita rakontis, ke ŝi lernas en la kvara klaso de elementa lernejo. Ŝi ŝatas la geografion kaj malŝatas la matematikon. Post kelkaj pluaj demandoj la konversacia materialo estis elĉerpita. Paŭzo ekestis.

Mi ekmemoris pri kelkaj leteroj kun diverslandaj poŝtmarkoj, kiujn mi havis en la poŝto, kaj pensis, ke per ili mi povus ĝojigi la knabinon.


“Ĉu vi kolektas ion, Sita?”

“Kolekti?...Ne, nenion mi kolektas” ŝi respondis.

Silento. Mi ekserĉis alian temon por vivteni la konversacion.

“Kaj ĉu vi kolektas ion, sinjoro? Kion vi kolektas?”

La fronta atako de Sita frapis min neatendite.



Mi ja estis veterana kolektanto de ĉio imagebla. Por ne kompliki la aferon, mi volis diri ion simplan, kiel poŝtmarkojn aŭ bildkartojn. Tamen post momento tio ŝajnis al mi neinda banalaĵo. Dum tempero mi pretis konfesi al ŝi la sekreton de mia vivo: mi kolektas aventurojn! Sed tio ŝajnis tro abstrakta. Ŝi certe ne kapablus kompreni min.

Dum kelkaj sekundoj mi rigardis tra la fenestro meditante. Ĉar ni sidis en la unua vagono de la trajno, mi klare povis vidi tra la fenestro la vaportufon elŝprucatan el sub la lokomotivo. La sunradio rompiĝadis tra la vaporo kaj formis duonrondan zonon de ĉielarko ĉirkaŭ ĝi.

“Ĉielarko!” mi ekkriis kun admiro.

“Kion?...Ĉu ĉielarkojn vi kolektas?” demandis mia inkvizitoro, kun la okuloj larĝe malfermitaj.

“Kion?... Jes, kompreneble, hm, ĉielarkojn. Ĉu io stranga pri tio?”

Sita ne sciis ĉu kredi al mi aŭ ne. Subokule ŝi ekzamenadis mian vizaĝon por malkovri sur ĝi ŝercan rideton. Sed ŝerca rideto tie malestis.

“Kaj kiel vi kolektas ilin?” ŝi kuraĝis finfine demandi.

La radoj de la vagono per monotona frapado akcentadis la sufokan atmosferon de la kupeo. La ĉielarko ĉirkaŭ la vaportufo vetkuradis kun la lokomotivo antaŭ miaj okuloj.

“Kiel mi kolektas ilin? Simple. Kie ajn mi vidas unu, mi enmetas ĝin en mian kolekton...Kompreneble, nur se mi ne havas ankoraŭ similan ekzempleron.”

La nigraj okuloj de Sita fikse rigardis min. Ili atendis. Ili atendis iun gravan malkovron.

“Ĉar ĉielarkoj povas esti, vi ja scias, tre diverspecaj...”

“La unua, kiu eniris mian kolekton, estis tre kutima ĉielarko. Mi vidis ĝin, kiam mi estis apenaŭ kvinjara. Mi subite ĉesigis la ludadon kun mia pli aĝa frato kaj aliaj vilaĝaj knaboj. Senspire mi gaxis al la bunta miraklo. Ĝi ŝajnis tiel proksima!”

“Mia frato, vidinte mian admiron, diris: ‘Tiu, kiu sukcesas pasi sub la ĉielarko, ĉiam en la vivo sukcesos plenumi sian deziron’ Li ŝajnis paroli serioze. Mi eĉ momenton ne dubis pri la vereco de lia aserto”.

“Senvorte, kvazaŭ hipnotita, mi ekmarŝis en la direkto de la mirinda pordego. Mi rapidis tra la vilaĝa strato ne deprenante la rigardon de la ĉielo, kaj alveninte al la rando de la vilaĝo mi daŭrigis la marŝadon tra la vasta paŝtejo. Ŝajnis al mi, ke mi rapide alproksimiĝas al la arko de ĉiuj sukcesoj”.

“Kaj ĉu vi sukcesis? Ĉu vi pasis sub ĝi?” senpacienis Sita.

“Ne, la suno malleviĝadis pli kaj pli, kaj la ĉielarko

paliĝis ĝis fina malapero. Nur mi restis sola kun mia senlima admiro, gapanta al la ĉielo.



“La vidaĝo de tiu ĉielarko restis tiel profunde gravurita en mia menso, ke mi senhezite povas diri, ke ĝi restis mia propraĝo. Tiu estis mia unua sperto pri la posedo de ĉielarko. Posedo, cetere, kiun

neniu povas de mi forpreni, okazu kio okazos.”

“Poste sekvis aliaj. Unu post la alia ili fariĝis miaj, kreante mian kolekton.”

*De Tibor Sekelj, el la legolibro “Paŝoj al Plena Posedo” de William Auld.*

**Elparolis: Luis Jorge Santos Morales**

*Vi povas aŭskulti la rakonton en la jena ligilo*

**Fonto: <https://soundcloud.com/luis-jorge-santos-morales/kolektanto-de-ĉielarkoj-de-tibor-sekelj-el-la-legolibro-paŝoj-al-plena-posedo-de-william-auld>**

Vortareto		grava	önemli	poŝo	cep
		gravur-ita	kazınmış, gravüre	poŝt-marko	posta pulu
abstrakta	soyut		edilmiş	pro-funde	derinlemesine
admira	hayranlık	hipnot-ita	hipnotize edilmiş	propr-aĝo	sahip olunan şey
akcent-adi	sürekli vurugalamak	imagebla	hayal edilebilir	rado	teker
alven-inte	vararaktan	inkvizitoro	sorgulayıcı	rando	kenar
apenaŭ	hemen hemen hiç	kapabli	becermek	ronda	yuvarlak
arko	yay	kie ajn	her nerede	rigardo	bakış
aserto	açıklama	kolekt-anto	koleksyoncu	romp-iĝ-adi	sürekli kırılarak (kendisi)
atako	atak, saldırı	kompliki	kariştirmek,		takip etmek
aventuro	macera		zorlaştırmak	sekvi	tereddüt etmeksizin
banal-aĝo	sıradan, adi	konfesi	itiraf etmek	sen-hezite	sınırsız
bild-karto	kartpostal	kre-ante	yaratarak	sen-lima	sabırsızlanmak
bunta	alacalı, karışık renkli	kupeo	kompartıman	sen-pacienci	nefessizce
ĉes-igi	bitirmek (bir şeyi)	kutima	kanıksanmış	sen-spire	kelimesizce
ĉiel-arko	gökuşağı	kvazaŭ	sanki	sen-vorte	şakacı
daŭr-igi	sürdürmek (bir şeyi)	lud-ado	sürekli oynama	ŝerca	deneyim
de-pren-ante	bir şeyden alarak	mal-apero	yok olma	sperto	garip
divers-landa	farklı ülkeden olan	mal-esti	var olmamak	stranga	aniden
diver-speca	farklı çeşitte olan	mal-kovri	keşfetmek, bulmak	subite	göz altından
dubi	şüphe etmek	mal-leviĝ-adi	sürekli aşağı inmek,	sub-okule	boğucu
duon-ronda	yarım yuvarlak		alçalmak	sufoka	havada asılı olmak
ekzamen-adi	sürekli muayene etmek	mal-ŝato	beğenmeme	ŝvebi	ter kokusu
ekzempl-ero	örnek parçası	medit-ante	meditasyon yaparak,	ŝvit-odoro	tema, konu
el-ĉerp-ita	tükenmiş olan		kendinden geçerek	temo	kısa zaman parçası
el-ŝpruc-anta	dışarıya fışkırmakta olan	menso	düşüncelere dalmak	temp-ero	3. sınıf
far-iĝi	olmak (kendisi)	miraklo	zihin	tria-klasa	buhar-duman
for-preni	alıp götürmek	mono-tona	mucize	vapor-tufo	geniş
frap-ado	sürekli vuruş	ne-atend-ite	monoton, tekdüze	vasta	gerçeklik
fronta	ön safta		beklenmeksizin,	ver-eco	emektar
gap-anta	ağzı açık seyreden	ne-inda	aniden	veterana	sürekli yarış koşmak
gapi	ağzı açık seyretmek	okazu kio okazos	mümkün olmayan	vet-kur-adi	görüntü
ĝoj-igi	sevindirmek (başka birisini)	pal-iĝi	her ne olcaksa (kio ajn okazos)	vid-aĝo	karşı karşıya
		paŝt-ejo	renge uçmak	vid-al-vide	canlı
			otlak	vigle	köylü
				vilaĝa	




Ĉi tiu artikolo ne estas simpla elpenaĵo, sed provo resumi kelkjardekan observadon de la Esperanto-movado tra la mondo kaj ĉefe de la informado pri Esperanto kaj de ties rezultoj. Evidente ĝi estas subjektiva prezento, sed mi provas

objektivigi ĝin.

Kiam mi estis juna esperantisto en Italujo, tiam la ĉeestaj kursoj estis ankoraŭ la spino de la tuta laboro. Mia forpasinta amiko, Mauro Latorre, poste prezidanto de ILEI, kutimis diri, ke esperantistoj agas ĝiskurse. Poste la afero laŭgrade ŝanĝiĝis kaj la nombro de lernantoj en ĉeestaj kursoj malpliigadis, la membroj de la asocioj (lokaj aŭ landaj malpliigadis), la tuta movado ŝrumpis, sed samtempe progresis la reto kaj la agadoj por Esperanto en la reto. La sola homo, kiu montras tendencon je kresko en la eŭropa movado estas Lu Wunsh-Rohlshofen, kiu baziĝas sur la nombro de partoprenantoj en internaciaj aranĝoj, sed mi kredas, ke liaj konkludoj estas tro optimismaj, ĉar intertempe la eŭropa socio ŝanĝiĝis tiel ke internaciaj vojaĝoj estas ege pli facilaj ankaŭ por tre junaj homoj.

Se vi aktive partoprenas la movadon, via perspektivo estas tute alia. La Londona Esperanto-Klubo, en kiu mi estas nun kaj pri kiu Zamenhof havis grandajn esperojn, nuntempe estas la ombro de la Londona Esperanto-Klubo en la komenco de la pasinta jarcento, kiam la urbestro de Londono ne estis tre malproksima de ĝi kaj famaj ĵurnalistoj estis en ĝi. Se Zamenhof hodiaŭ venus al Londono neniu honore akceptus lin en la urbodomo.



Ĉu ĉi tio okazas en la tuta mondo? Nu, la situacioj estas malsamaj kaj ni konsideru ilin aparte laŭ la kontinentoj, de la kontinentoj plej favore respondantaj al la informado pri Esperanto al la aliaj. Tio ne signifas, ke oni devas ignori kelkajn kontinentojn, sed, se la celo estas produkti esperantistojn, oni prefere sciu pri la reagemo en la unuopaj kontinentoj.

## Afriko

La afrika movado, kiel ĉiuj scias, estas kreaĵo lastatempa, de la dua duono de la pasinta jarcento. Ni preteratentu la asociojn ĉefe eŭropanajn de la komenco de la pasinta jarcento. Ili elvaporigis kiel fumo, kiam la eŭropaj koloniantoj revenis al Eŭropo.

La nuna afrika movado konsistas el homoj, kiu energie provas plibonigi sian materian situacion kaj alkroĉiĝas al ĉio, kio povas helpi pri tio. Esperanto, kiel afero venanta el Eŭropo, el la ĝenerale riĉa Eŭropo laŭ la supozo, estas rigardata kiel io, kio povus helpi pri tio kaj efektive ĝi helpas diversmaniere, per vojaĝoj al Eŭropo per helpa mono, kiu venas el Eŭropo por pluraj projektoj. Ĉu la multaj monpetoj estas ĉiuj klopodoj trompoj? Ne ĉiuj, sed multaj estas. Aliflanke ili estas ankaŭ pruvo pri la vicleco de la movado.

Ĉiukaze la akceptemo al Esperanto estas tre pli vigla ol en aliaj kontinentoj. Kompreneble estas ankaŭ malavantaĝoj ĉar reta lernado en Afriko ne estas ankoraŭ facila ĉie aŭ kutima. Lernantoj aperas en kursoj aŭ pretas lerni el skribita materialo, kiun oni devas sendi. La sendado de papera materialo el Eŭropo iĝis tre probelma pro la grandaj kostoj. Plej simple estus sendi tiujn materialon el afrikaj deponejoj mem.

Sed pri la nombro de respondoj al anoncoj ne estas komparo, kun Eŭropo au kun aliaj kontinentoj.

## Azio

Azio, laŭ mi, estas la dua kontinento laŭ respondemo al anoncoj pri Esperanto. La situacio tie estas malsama ol en Afriko. Oni ne esperas pri materiaj gajnoj. Ili estas ĉiuj konvinkitaj, ke ĉi tiu estas la jarmilo de Azio kaj ke materiaj gajnoj ĉiukaze alvenos pro la rapida evoluo de tiu kontinento. En Azio estas kelkaj landoj kun tradicia movado, Ĉinujo, Japanujo, Koreujo, Vjetnamujo, Irano, kaj estas multaj aliaj landoj kun apenaŭa movado, de Laoso al Barato por ne paroli pri la landoj de la ekssoveta Centra Azio. Do la spaco por informado estas granda, eĉ grandega.

Tiu, kiu sukcesos starigi movadon en Barato meritos tiom da statuoj, kiom havas Zamenhof. Estas hontinde por la movado pretelasi Baraton.

La rezultanta movado en Azio estos tute alikarakterata



ol tiu en Afriko. Ĝi estos io bazita sur idealeco, kvankam iom malsimila ol estas eŭropaj movadoj. La homoj estas tre fieraj pri si kaj pri siaj kulturoj. Espereble ili povos plimondigi la Esperanto-kulturon, kiu restas eŭropa en granda parto. Nun aldoniĝas en Facebook la usona junulara kulturo, sed Azio terure mankas.

### **Suda Ameriko**

Post Azio venas Suda Ameriko sed ne ĉiuj landoj samkvante. Evidente Brazilo en ĉi tiu historia momento sentas sin preta por evolui multe pli ol la ceteraj landoj. La aktivemo de brazilaj esperantistoj estas konata kaj en la reto kaj ekster la reto. Kiam mi estis prezidanto de UEA kaj alvokis por trovi helpantojn pri agadoj, mi ricevis respondojn nur el Brazilo aŭ el Ĉinujo. Ĉu ni eltiru instruon el tio?

Sed ankaŭ el la hispanlingvaj landoj nun venas signoj pri moviĝo. El Sankta Domingo, el Kolombio el Peruo, el Ĉilio. Do, entute Suda Ameriko estas ankaŭ bona kontinento por informado pli pri la idealoj ol pri la praktikaj avantaĝoj, kiuj estas tre laŭmodaj inter junaj eŭropanoj, sed malfacile ĝueblaj de junaj sudamerikanoj, se ili ne multekoste vojaĝas al Eŭropo. Cetere, rilate al Afriko la eblecoj retaj estas tre pli grandaj ĉie.

### **Norda Ameriko**

En Norda Ameriko estis movado tro malforta en la dua duono de la pasinta jarcento kaj tial oni ne povis ekspluati la superregan pozicion de Usono, ankaŭ en kulturo, por Esperanto. Sed kelkaj artikoloj pri Esperanto aperintaj tie estis represataj tra la tuta mondo. Same okazis pri kelkaj libroj aperintaj en Usono pri Esperanto kaj interlingvistiko, kiuj iĝis konataj kaj influaj tra la mondo. La novaĵo de la lasta jardeko estas la sukceso de la kurso pri Esperanto Duolingo, kiu altiris multajn junajn usonanojn kaj neŭsonanojn. Estas ankoraŭ frue por taksii la efikojn de tio sur la movadan panoramon en Usono, sed jam oni povas diri, ke tiuj efikoj aspektas esperige. Aliflake el la vidpunkto de investado por informi pri Esperanto en Norda Ameriko, mi restas skeptika pri la rilato kosto/rezulto, en la senco, ke la kostoj devus esti tre

altaj.

### **Orienta Eŭropo**

La movado en Orienta Eŭropo estis tre granda, sed kiam tiu mondoparto forlasis komunismon, ĉiuj, inkluzive de Dio kaj de la Okcidento, forlasis ĝin. Rezultis tre stranga periodo, en kiu kulturo perdis siajn antaŭajn eblecojn. Aliflanke nun la movado iel reakiris iun provizoran ekvilibron en pli malalta situacio, la reto bone funkcias kaj homoj eble respondos al vokoj pli praktikaj ol idealaj.

### **Okcidenta Eŭropo**

En Okcidenta Eŭropo mi ne vidas grandan respondemon al anoncoj pri Esperanto, kvankam oni ĉiam trovas kelkajn individuajn ulojn, kiuj pro interesiĝo pri lingvoj aŭ surbaze de esperataj avantaĝoj pretas lerni Esperanton. Itala Esperanto-Federacio havas kampanjon pri informado pere de Google kaj Facebook, kiu portas fruktojn en la kvanto de kelkaj dekoj da aliĝintoj ĉiujare al la reta kurso prizorgata de IEF. En tiuj limoj informado estus bonvena en ĉiuj okcident-eŭropaj landoj.

### **Oceanio**

Oceanio ne estas tute neglektinda, kvankam el organiza vidpunkto ili aliĝis la la Azia Komisiono, sed la plej respondemaj landoj estas la neanglalingvaj, kiel Indonezio aŭ pluraj pacifikaj insuloj. Aparte en Indonezio mi vidas la samajn ŝancojn, kiuj ekzistas en Azio.

### **Arablingva mondo**

Ekzistas krome kontinento, la arablingvaj landoj. Pro serio de kaŭzoj ili estas la malplej respondemaj landoj. Oni devas konsideri la malfacilan situacion kaj kulturan kaj socian en ĉiuj tiuj landoj. Tie ĉio, kio venas el la Okcidento, estas rigardata kun pravigebla timo kaj ankaŭ kun nekonfesebla deziro. Oni devos atendi kaj la evoluon de tiuj landoj, se oni lasos ilin liberaj evolui mem, kaj pli pacan situacion kun malpli religia socio.

**Prof. Renato Corsetti** <sup>1</sup>

<sup>1</sup> Renato Corsetti estas itala esperantisto. Li estis profesoro pri Psikopedagogio de Lingvo kaj Komunikado en la Universitato de Romo, Prezidanto de TEJO (1971-73), UEA estraro (1980-86, 1998-07), prezidanto de UEA (2002-2007), profesoro de AIS, membro de Akademio de UEA, prezidanto kaj estraro de Itala Esperanto-Federacio, ka.

## Kial mi lernis Esperanton?



Unuafoje la vorton "Esperanto" mi vidis en 1948 jaro. Tiam en urbo Jelenia Góra, kie mi tiutempe loĝis, oni inaŭguris memorŝtonon omaĝe al Ludoviko Zamenhof (foton Vi trovos en la grupo "Zamenhof amikaro"). La afero tute ne

ekinteresis min - tiutempe 10-jaraĝan knabon.

Gepatroj aligis min al la kurso de angla lingvo kiu estis gvidata en loka filio de YMCA. Mi komencis lerni. Ĝis nun mi posedas la lernolibron de tiu tempo. Post eble duonjaro la povo malpermesis ekziston de YMCA en Pollando kiel "malamikan, imperiisman organizaĵon, neston de usona ŝpionado". Nu - ekde la kvina klaso de baza lernejo mi komencis lerni la rusan lingvon. Tiutempe mi jam delonge konis la lingvon parolan, nun mi eklernis la lingvon skriban - gramatikon, ortografion.

Poste mi transloĝiĝis al Wrocław (Vroclavo), finis teknikan mezlernejon kaj septembre de 1956 komencis labori. Dum ferioj post fino de la lernejo mi pasigis du semajnojn ĉe mia fora onklino en Krakovo. Mi trovis ĉe ŝi malgrandan lernolibreton de Esperanto kies aŭtoro estis Leo Turno. Antaŭmilite mia onklino laboris en firmao produktanta medikamentojn kies posedanto estis iam fama esperantisto doktoro Odo Bujwid. Mi iom trarigardis la libreton kaj konstatis, ke se iu vorto estas simila al pola, la alia estas simila al germana (mi ankaŭ iom ĝin parolis) kaj ankoraŭ alia estas vorto "internacia". Sed tiutempe mi plu intencis lerni la anglan. Tiam ankaŭ mi aliĝis al la kurso de la angla lingvo kiun gvidis ŝtata eduka organizaĵo. Nun mi devas diri ion pri la mono. Mi perlaboris monate 800 zlotojn. La kurso monate kostis 150 zlotojn. Nu - elteneble. Mi ankaŭ devis subteni 7-personan familion do malmulte restis al mia propra uzo.

Post unu jaro de lernado, aŭtune de 1957-a jaro mi aliĝis al la duagrada kurso. Sed jam mi devis pagi monate 180 zlotojn. Mi grincis per la dentoj, sed pagis. En decembro oni anoncis, ke ekde 1958 la monata kotizo kreskos ĝis 250 zlotoj. Kaj mia salajro dume "ne volis" kreski. Mi rezignis pri plua lernado. Mi pensas ke la kotizaltigo estis ia ŝtata metodo malfaciligi lernadon de okcidentaj lingvoj. Nur en malmultaj lernejoj tiutempe oni instruis aliajn fremdajn lingvojn anstataŭ la rusa.

Kiam mi diris pri mia decido - mia patro diris - aliĝu al la kurso de Esperanto - estis anonco en gazeto. Kaj li diris frazon "inteligenta homo legas multajn librojn" - esperantlingve! Kaj mi - ne demandis de kie li konas la frazon!

Mi iris al la loka sidejo de la Asocio de Esperantistoj en Pollando (Vroclavo, str. Dubois 3) kaj aliĝis al la trimonata kurso. La monata kotizo estis ... 20 zl. La kurson mi finis kun tre bona rezulto. Nu - mi devas konfesi, ke legi mi iom povis kaj helpe de vortaro komprenis, sed la parolan lingvon mi preskaŭ ne komprenis. Mi aliĝis al la Asocio kaj sekvintjare - en marto de 1959-a jaro aliĝis al duagrada kurso. Ĝin mi ankaŭ finis bone. La lingvo ekkomencis esti komprenebla por mi.

Pri mia partopreno en la Asocio estas jam tute alia rakonto kiun eble-eble iam mi skribos. Titolo de tiu ĉi artikoleto estas ja "Kial mi lernis Esperanton".

**Toeko (Pollando)**

**Fonto:**

**<http://www.ipernity.com/blog/32594/120462?lc=1#comments>**

## Vivlongiga metodo inventita de rusa sciencisto



Lastatempe, speciala kirurgio estis farita en iu medicina instituto en Moskvo. Metodo pri vivlongigo estas transplantado de trunka ĉelo. Oni unue ekstraktas la trunkajn ĉelojn el la juna korpo de iu homo, ilin fridigas kaj post kelkaj jaroj ilin transplantas en la maljuniĝintan korpon de tiu persono. Per tiu maniero efektiviĝis la metodo de vivlongigo.

La testo en animalo jam sukcesis kaj tiu en musoj montris ke la vivo de musoj pli longiĝis je 34% kompare kun tiu de la musoj al kiuj oni ne plantis trunkajn ĉelojn. Tiele, tiu rusa sciencisto esperas provi sian inventon en si mem.

**Fonto:** [http://www.espero.com.cn/2016-10/08/content\\_39444132.htm](http://www.espero.com.cn/2016-10/08/content_39444132.htm)



## Lingvoj kaj Pensado



Antikva demando okupas la kapon de psikologoj, filozofoj kaj sciencistoj: ĉu ekzistas pensoj sen lingvo? Alivorte, ĉu ekzistas pensoj, kiujn oni ne povas esprimi per vortoj?

Lastatempa konsento inter fakuloj starigas, ke ne. Oni venis al konkludo (malgraŭ la subjektiveco de tiu problemo), ke por pensi, homo bezonas lingvon. Se oni ne havas vortojn, ne eblas havi pensojn.

Ĉu tio estas ekskluzive teoria demando, sen praktika apliko? Tamen, ne. Dua paŝo sur tiu vojo de scienca esplorado proponis la jenan demandon: ĉu pensado en dua lingvo (ne en la gepatra lingvo) modifas la kvaliton de la pensoj?

Lastatempe, sciencistoj okupiĝas pri tiu kurioza ebleco. Kompreneble, lingvoj ligiĝas al emociaj aspektoj en la psiko. La gepatra lingvo, ekzemple, portas en si tute malsaman emocian ŝarĝon ol lingvo lernita en plena aĝo. Ĉu tia malsameco influas la pensadon?

Por respondi al tio, sciencistoj petis, ke homoj pensu pri praktikaj decidoj rilate al moralaj dilemoj. Ekzemple, ili proponis jenan situacion: 'Ĉu vi puŝus unu homon al morto sur fervojaj reloj, se tio savus la vivon de aliaj kvin homoj?' Temas pri morala konflikto, kaj – mirinde! – la decido ofte ŝanĝiĝas, kiam oni pensas pri ĝi en alia lingvo ol la gepatra. Kiam homoj pensas en alia lingvo, la respondo favora al 'jes' kreskas de 20 procentoj al 50 procentoj el la respondantoj.

La konkludo estas, ke en fremda lingvo oni suferas malpli da emociaj influoj kaj fokusas prefere la plej utilajn, efikajn rezultojn en vivsituacioj. Tiuj rezultoj ne dependas de tio, kiu estas la koncerna fremda lingvo, ĉu hispana, angla, germana, k.t.p..

Pensante en dua lingvo, oni rezonas malpli alkroĉite al moralaj konceptoj, oni eltenas pli facile riskojn. Kreskas la interesiĝo pri gajnoj kaj insultoj ofendas malpli forte. Tio signifas, ke en dua lingvo varias la etikaj aspektoj de homaj intencoj.

Tiuj konkludoj konfirmiĝis fronte al diversaj homaj situacioj, ĉiam prezentantaj moralajn dilemojn. Sciencistoj provas klarigi tiun fenomenon. Ili supozas unue, ke pensado en alia lingvo ol la gepatra estas pli malrapida. Krome, pensado en gepatra lingvo estas pli 'intuicia'. Siavice, pensado en alia lingvo postulas pli zorgan elekton de vortoj – sekve de konceptoj.

Ĉi tiuj novaj esploroj ĵetas plian lumon al la monda lingvoproblemo. Ni pensu pri decidoj farataj en konferencoj de tutmondaj institucioj. Se tie ĉiuj delegitoj uzas unu solan etnan lingvon, ĉu la kvalito de la argumentado estas la sama, se parolas (kaj voĉdonas) uzantoj de gepatra lingvo aŭ de fremda lingvo? Ĉu unu sola neŭtrala lingvo ne estas pli rekomendinda?

**Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis Paŭlo Sergio Viana el Brazilo, vi ankaŭ povas aŭskulti la tekston en la jena ligilo:**

**Fonto:**

**[http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2016/09/li-  
ngvoj-kaj-pensado.html?view=flipcard](http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2016/09/li-<br/>ngvoj-kaj-pensado.html?view=flipcard)**

## Brita eksiĝo el EU kaj Esperanto



1. Temas pri la angla kiel ĉefa laborlingvo de EU. Sen Britio (en EU) fakte pli malmulte ol antaŭe ekzistas "memevidenta" rajto/lico por la angla esti uzata kiel tia.
2. La angla jam en la jaro 2011 estis severe kritikata de ATTAC kiel

lingvo de detru(em)a novkoloniismo, t.e. de la globaligo, bezonanta pli fortan demokratian kontrolon.

3. La kialoj, pro kiuj ĝis nun la kondicoj de soci(al)a justeco kaj sana vivmedio tutmonde ĉiam malbonigadas, estas lingve/kulture grave ligataj al la ekonomia merkatmodelo de ĉefe angle perata novliberalisma pens- kaj agad-modelo - kaj ĉi modelo

## Wolfgang Günther

estas ĝuste tiu, kiu ankaŭ malpermesas evoluigon de la tergloba mensostato al pli da egaleco kaj justeco en la kampo de lingvoj kaj internacia/transkultura komunikado. La estonteco de la homaro estas ankaŭ afero de kulturo/lingvo... **"Lingvo ekstere de sociala justeco kaj sana vivmedio ciukaze estas groteskaĵo"**

4. La moderna difino de esperanto tekstas: **"Esperanto estas la lingva parto de neŭtrala internacia/transkultura kaj soci(al)e justa/ekologie daŭripova komunikado."**

**Fonto: Sennaciulo 2016 #07-08 (p.15)**



La homo, kiun mi devas danki pro mia esperantistiĝo, estas mia praonklo, Julius Löwenstein. Fakte, mi neniam renkontis lin; li mortis antaŭ mia naskiĝo. La nazioj venis al lia hejmo iun matenon tre frue kaj forkondukis lin kiel judon.

Mi aŭdis pri mia praonklo Julius de mia patro, kiu memoris lin kun granda amo. Li estis homo kun multaj intereso, kaj inter tiuj intereso estis Esperanto. La familio loĝis en Nurenbergo, do certe li multe aŭdis pri la lingvo dum la Universala Kongreso de 1923, kiu estis unu el la plej grandaj kongresoj en la historio de la movado. Tial li entuziasmiĝis – sed ĉu li mem lernis la lingvon? Fakte, mi ne scias, ĉu li vere estis esperantisto.

Mi decidis lerni Esperanton, kiam mi havis 13 jarojn. En mia lernejo oni kutime ekstudis la francan en la unua klaso (je 11 jaroj), kaj la latinan en la dua. Por ni anglalingvanoj, la franca prezentis plurajn eksterordinarajn novaĵojn, precipe la konceptojn pri gramatika genro kaj pri verbaj konjugacioj. La angla, same kiel Esperanto, kutime ne havas genrojn, do la instruistino devis klarigi al ni, ke en la franca “libro” estas vira, dum “seĝo” estas ina – tio ŝajnis al ni infanoj tre stranga, kaj ankaŭ iom amuza! Krome la verboj en la angla estas tiel simplaj, ke anglalingvaj infanoj lernas ilin nature kaj ne bezonas studi ilin en la lernejo. Do ni tre surpriziĝis pro la malkovro, ke en la franca estas aparta verbo-finaĵo por ĉiu pronomo.

Kaj krome estis la neregulaj verboj. Ne sufiĉas en la franca, ke ĉiu pronomo havas sian propran finaĵon; ĉe multaj verboj tiuj finaĵoj ne sekvas la regulojn, tiel ke necesas lerni ilin aparte. Post ĉiu leciono de la franca ni iris hejmen kun du aŭ tri novaj verboj, kiujn ni devis lerni parkere. Tial okazis, ke iun vesperon mi demandis min, “Ĉu ne eblus lerni lingvon, kiu ne havas neregulajn verbojn?” Kaj kompreneble mi tuj sciis la respondon, kiun mi jam aŭdis de mia patro: Esperanto.

Mi iris al la publika biblioteko, kaj tie trovis la libron Teach Yourself Esperanto (“Instruu al vi mem Esperanton”). Por homo, kiu jam studis la francan kaj la latinan, Esperanto estis evidente tre facila. Mi tralegis la unuajn lecionojn senprobleme, kaj rapide progresis. Fakte, mi eĉ tro rapide progresis: la lingvo estis tiel facila, ke mi ne ĝenis min lerni parkere la

novajn vortojn, kiuj aperis en ĉiu ĉapitro. Tial mi ne memoris ilin precize kaj ne povis bone fari la ekzercojn, kiuj troviĝis en la libro. La sekvo estis, ke post sep-ok ĉapitroj mi enuis kaj reportis la libron al la biblioteko.

Sed evidente la intereso restis, ĉar post kelkaj monatoj mi decidis provi denove. Mi re-pruntis la libron, kaj ĉi-foje mi studis ĝin pli serioze, lernante parkere ĉiujn novajn vortojn, same kiel mi farus en la lernejo. Sekve, ĉi-foje mi finis la kurson.

En la fino de la libro aperis la adreso de Brita Esperanto-Asocio. Kvankam mi havis tre malmulte da mono, mi skribis al BEA kaj membriĝis. Mi ankaŭ elektis el ĝia katalogo facilan legolibron kaj la plej malmultekostan vortareton. La libron mi povis legi senprobleme, sed la revuo de BEA estis pli malfacila. Multaj vortoj ne troviĝis en mia malgranda vortaro; mi memoras, ke aparte mistera por mi estis la vorto samideano. Mi ne sukcesis kompreni, ke temas pri sam-ide-ano “membro de la sama ideo” (alivorte, esperantisto).

Eĉ pli malfacila estis Kial ne? la revuo de Junularo Esperantista Brita, kiu havis tre aventureman lingvovozon, absolute ne kompreneblan por komencanto. Mi tamen vidis en ĝi anoncon pri junulara semajnfino proksima al Londono, kaj iom nerve veturis al ĝi. Mi estis nur 15-jara, kaj neniam antaŭe iris sola al tia aranĝo. Kiam mi alvenis, mi miris, ke la plejmultaj de la partoprenantoj havas pli ol 20 jarojn, kaj kelkaj eĉ atingis 30! Al mi, tio tute ne ŝajnis juna! Bonŝance, estis ankaŭ pluraj lernejoj, samaĝaj kiel mi. Mi ĝuis la semajnfinojn, kaj konstatis, ke mi bone komprenas ĉion. Bedaŭrinde, mi estis tro timema por mem provi paroli en Esperanto.

Kvankam mi loĝis en Londono, por viziti la plej proksiman Esperanto-klubon mi devis veturi pli ol unu horon per tri aŭtobusoj. Kaj kiam mi alvenis, mi trovis tute malgrandan grupon da homoj, multe pli aĝaj ol tiuj ĉe la junulara renkontiĝo. Ili ĉiam entuziasme salutis unu la alian en Esperanto – sed post la salutoj ili simple daŭrigis en la angla. Mi ne malkuraĝiĝis, kaj eĉ pluiris dum kelkaj monatoj, sed en la fino mi rezignis, precipe ĉar mi devis prepariĝi por lernejoj ekzamenoj.

Post tio mi fakte rezignis pri Esperanto dum pluraj jaroj. Sed la semo restis kaŝita kaj de tempo al tempo donis etan vivosignon. Mia esperantista vivo vere

komenciĝis kiam mi loĝis dum kelkaj jaroj en Israelo, kie mi vizitis la lokan klubon en Tel-Avivo. Tie mi trovis grandan kaj vigan grupon, kie la homoj vere paroladis inter si en Esperanto, kaj kun tre aktiva junulara sekcio. Inter ili mi renkontis junulinon, kiu estas ankoraŭ unu el miaj plej bonaj amikinoj, kaj estis ŝi, kiu montris al mi malgrandan anoncon en revuo Esperanto pri volontula posteno en la Centra Oficejo de UEA (Universala Esperanto-Asocio) en Roterdamo.

Tiel, dek tri jarojn post kiam mi unue serĉis la libron de Esperanto en la loka biblioteko, mi fariĝis aktiva en la Esperanto-movado. Kion pensus mia praonklo Julius, se li scius, ke lia pranevino edziniĝis al esperantisto, parolas la lingvon kun sia familio, kaj mem verkas en ĝi librojn kaj artikolojn?

**Verkita de Anna Löwenstein  
en 2006 por Revuo Por Komencantoj**

## La Junaj Detektivoj - Ĉapitro 6

## Mez-nivela



Silente la ĝemeloj reiris, preterpasis la enirejon de la subtera tunelo, kaj atendis malantaŭ ŝtonego. Baldaŭ ili vidis la onklon, kiu revenis kaj portis grandan pakaĵon. Li eniris la tunelon, sed Andreo metis la manon sur la brakon de Lizbeta.

"Restu ĉi tie," li diris.

"Mi volas rigardi tiun vojeton por vidi, se eble, kien ĝi kondukas.

Li transiris ĝis la loko, kie li aŭdis la voĉojn de la du viroj, kaj dum li malrapide kaj zorge venis al la angulo, subite la alia viro aperis. En la sama momento li kaptis Andreon kaj tenis lin per fortaj brakoj.

"Kion vi faras ĉi tie?" li demandis.

"Faras promenon," respondis Andreo kuraĝe.

"Kiu scias, ke vi venis?"

"La polico!" respondis la knabo.

"Mi ne kredas vin. Se mi puŝos vin en la akvofalon, oni poste trovos vian kadavron kaj kredos, ke vi falis en la riveron."

Andreo ekstremis. Ĉu tia estos la fino de la granda aventuro, kaj de lia vivo?

"Tamen," daŭrigis la viro, "mi ne estas murdanto. Sed mi ne povas permesi, ke vi estu libera, por informi la policon pri ni. Vi venos kun mi, kaj mi transdonos vin

al mia estro. Eble li murdos vin; mi ne scias."

Kaj li tiris Andreon post li en la vojeton. Antaŭ ol li malaperis, Andreo rigardis malantaŭen al la ŝtonego, kie Lizbeta atendis. Li kredis, ke li povas vidi ŝian palan vizaĝon, kiu rigardis ĉion, kio okazis.

Tiam li ne plu povis vidi ŝin, ĉar li estis sur la mallonga vojeto, kaj unu momenton poste li estis en alia tunelo. Ĝi estis tre longa, sed la viro marŝis rapide, kaj la knabo devis sekvi. Dum longa tempo la viro tiris Andreon rapide tra la malluma tunelo, ĝis finfine la knabo vidis malgrandan lumon malproksiman antaŭ ili.

Kiam ili atingis la lumon, li trovis, ke ĝi estas la fino de la tunelo, kaj ili estis denove sub la ĉielo. Ili estis nun inter rokoj, kaj la viro tiris lin laŭ malfacila vojeto, sed post nelonge la vojeto kondukis ilin al pli granda vojo. Estis ankoraŭ mallume, sed la luno brilis tra la nuboj, kaj Andreo povis vidi la vojon, kiu kondukis ilin inter altaj arboj. Li atente rimarkis ĉion; eble li bezonus la scion poste.

Post longa marŝado la knabo vidis domojn, kaj li supozis, ke tio estas la urbeto Svenburg. Subite la viro sin turnis kaj tiris Andreon al la pordo de unu el la domoj.

La viro frapis mallaŭte ĉe la pordo, kiu baldaŭ malfermiĝis kaj vidigis virinon. Ŝi signis al ili eniri, tiam ŝi ŝlosis la pordon, kaj ili iris en malgrandan ĉambron. Lampo staris sur la tablo, kaj per ĝia lumo Andreo povis klare vidi, por la unua fojo, la vizaĝon de la kaptinto. Li estis granda viro kun nigraj haroj kaj okuloj, kaj li respondis per mallongaj frazoj dum la virino demandis al li pri Andreo. La knabo rimarkis, ke ŝi nomis la viron Helmo, kaj li supozis, ke tio estas ties persona nomo. Li ne havis ideon pri lia familia nomo.

Baldaŭ Helmo denove prenis lian brakon, kaj kondukis



lin supren laŭ malluma, mallarĝa ŝtuparo al tre malgranda ĉambro, en kiu estis lito kaj lavtablo. Sur la tablo estis kruĉo. Tiam Andreo vidis per la lumo de la luno, kiu envenis tra malgranda fenestro kiu troviĝis alte en la muro.

"Ĉi tie vi restos ĝis kiam oni decidis, kion fari pri vi," diris Helmo. Tiam li malfermis tirkeston kaj elprenis vipon.

"Kaj se mi aŭdos ian bruon de vi, vi sentos ĉi tion," li aldonis. Tiam li foriris, kaj Andreo aŭdis la turnon de ŝlosilo en la seruro.

Laca post la aventuro, ĉar li ne dormis dum la tuta nokto, Andreo kuŝiĝis sur la lito, kaj baldaŭ ekdormis. Kiam li vekigis, la suno brilis sur la kruĉon, kaj ankaŭ seĝon kiu staris en angulo de la ĉambro, sed estis nenio alia. Ankoraŭ iom laca, li restis sur la lito kaj pensis pri la aventuro. Kie nun estas Lizbeta? Feliĉe, Helmo ne vidis ŝin, kaj ne scias, ke ankaŭ ŝi estis tie sub la akvofalo. Estis feliĉe ankaŭ, ke Helmo ne kriis al onklo Konrado, kiam li trovis Andreon, ĉar nun la onklo scias nenion pri la afero. Ĉu li jam trovis, pensis la knabo, ke la ĝemeloj ne estas ĉe la farmdomo? Aŭ ĉu Lizbeta reiris tien, kaj, se jes, kion ŝi diris al la geonkloj? Kaj kiel ŝi klarigis la foreston de Andreo?

Tiel pensis la knabo dum li kuŝis sur la lito. Tiam li aŭdis paŝojn, kiuj supreniris la ŝtuparon. La pordo malfermiĝis, kaj Helmo envenis. Li portis teleron, sur kiu estis kelkaj pecoj de pano.

"Jen via matenmanĝo," li diris "Estas akvo tie en la kruĉo." Kaj li signis per la mano al la tablo.

"Sed vi ne alportis tason," diris Andreo.

"Tason? Kial vi deziras tason? Vi havas manojn, ĉu ne?" Kaj kun mallonga rido Helmo eliris, kaj denove ŝlosis la pordon.

Andreo iris al la pordo kaj frapis ĝin per la manoj.

"Mi deziras tason," li kriis laŭte.

Li aŭdis, ke la paŝoj de Helmo revenis, la pordo denove malfermiĝis, kaj la viro envenis. Li marŝis rekte al la tirkesto de la tablo, elprenis la vipon, kaj turnis sin al Andreo.

La knabo penis defendi sin, sed li povis fari nenion kontraŭ la granda, forta viro, kiu tenis lin facile per unu mano, dum per la alia li donis al li du fortajn batojn de la vipo. Andreo sentis la severan doloron ĉe la dorso, kaj apenaŭ povis ne krii.

"Jen," diris Helmo. "Mi diris al vi, kio okazos, se mi aŭdos ian bruon de vi. Tio estas nur por averti vin, ĝis vi estos preskaŭ senviva. Ne forgesu!" kaj denove li foriris.

Andreo kuŝis sur la lito sen espero. Li ne sciis kiel li povos eskapi de ĉi tie kaj de Karenlando. Li kredis, ke li eble povus retrovi la tunelon, kiu kondukas al la akvofalo, sed unue li devis eliri el la ĉambro kaj el la domo, kaj tio ne estis ebla. La pordo estis ŝlosita.

Nu, li pensis, estas neniu kialo, kial li ne povas manĝi la sekan panon, kaj trinki iom da akvo. Li tion faris, kaj sentis sin pli forta kaj pli freŝa. Tiam li rigardis la fenestron. Eble li povus eskapi tra tio? Sed ĝi estis tro alta en la muro. Li eĉ ne povis trarigardi ĝin; li povis vidi nur la ĉielon.

Tiam li pensis pri la seĝo. Se li staros sur ĝi, eble li povos atingi la fenestron. Silente li movis la seĝon el la angulo, metis ĝin sur la fenestron, kaj staris sur ĝi. Li trovis, ke li povas vidi la straton. Sed sub la fenestro estis nenio, krom la pavimo -- distanco de dek metroj! Plue, kvankam la fenestro estis malfermita je du-tri centimetroj ĉe la supro, li ne povis pli malfermi ĝin. Estis neeble eskapi!

(daŭrigota)

Vortareto		kadavro	ceset	supozi	vasraymak
		konduki	götürmek,	lavtablo	yıkama masası
akvofalo	şelale		yönetlemek	tirkesto	çekmece
baldaŭ	yakında	pavimo	kaldırım	vidigi	göstermek (bir şeyi)
brako	kol	peni	denemek, çalışmak	vidiĝi	görünmek (kendisi)
defendi	korumak	seruro	kilit	vipo	kırbaç
eskapi	kaçmak	signi	işaret etmek		
espero	umut	ŝtuparo	merdiven		



Ĉu Esperanto estas taŭga ilo por poezio? Jam Zamenhof pripensis tiun ĉi demandon, sed sendube Kalocsay sin dediĉis dumvive al ĝi, kaj de liaj studoj priaj ŝprucis ne nur impona poemaro kaj originala kaj traduka, sed ankaŭ gvidlinioj por kompreni la spiriton de la Esperanto-poezio.



Kálmán Kalocsay naskiĝis en 1891 en la vilaĝo Abaújszántó, en norda Hungario kaj iĝis kuracisto kaj infektologo en budapeŝta malsanulejo. Pasintjare oni festis la centan datrevenon de lia esperantistiĝo. Tiel do, li ellernis la Zamenhofan lingvon en 1911. Estas pluraj kialoj por lerni Esperanton, sed por

Kalocsay la internacia lingvo devis esti ankaŭ lingvo literatura. Same en 1911 esperantistiĝis Julio Baghy, kiu ankaŭ naskiĝis samjare kiel Kalocsay. Ĉu mi troigas se mi diras, ke la fojfoje ŝtorma rilato ene de tiu “ora duopo” signis la estontecon de la Esperantaj literaturo, lingvo kaj movado?

Nu, kiel paroli pri Kalocsay? Ĉu pri Kalocsay la poeto, Kalocsay la redaktoro, Kalocsay kiu obsede studis grekajn heksametrojn? Ĉu pri la homo kiu sin vualis, sed neniam kaŝis, sub senfinaj plumnomoj?

Tridekjara, Kalocsay la poeto aperigis sian unuan poemaron Mondo kaj koro, kaj nur unu jaron poste naskiĝis Kalocsay la redaktoro. En 1922 Teodoro Schwartz starigis Literaturan Mondon, kie Baghy kaj Kalocsay agis kiel ĉefredaktoroj. Estis Kalocsay kiu unue adreŝis sin “Al la legantoj” por defendi revuon “plene literaturan”, heredanton de Lingvo Internacia kaj La Revuo. Oni ne bezonas paroli pri tiu juvelo de la Esperanta beletro, sed por bone kompreni ĝian historion oni povas komence legi la artikolon La tri vivoj de Literatura Mondo[1], verkitan de Kalocsay mem.

Poezio estis por Kalocsay sankta afero, preskaŭ lia “interna ideo” de Esperanto, kaj li malbone toleris amatorojn. Jam en la unua numero de Literatura Mondo li impetis kontraŭ la facilrimaj adasistoj, “homoj kiuj neniam provis ĉarpenti eĉ unu strofon en sia gepatra lingvo, lerninte Esperanton subite trovas en si

kapablon poezian kaj provas per kuraĝa salto eksidi sur la dorso de la Pegazo”[2].

Dum tiu unua periodo de LM, ni vidas Kalocsay-on la poeton (Patrineco), la recenziston de Eŭropa literaturo sub la kaŝnomo Kopar, ni vidas la homon kiu neniam evitas gramatikajn diskutojn (ekzemple, pri ci) kaj la tradukiston kiu prezentas al la mondo verkojn de siaj samnacionoj Sándor Petőfi kaj Endre Ady, sed ankaŭ de Baudelaire, Verlaine, Goethe aŭ Tennyson; eĉ la Kolomanon de la teatra trupeto ni trovas sur la paĝoj de LM.

La unua vivo de Literatura Mondo finiĝis en 1926, kaj kvin jarojn poste, en 1931, ekiris la dua periodo, eble la ora epoko de la Esperanta literaturo aŭ almenaŭ de la Budapeŝta Skolo. En tiu dua periodo fondiĝis ankaŭ la eldonejo Literatura Mondo, kaj jam en somero 1931 ĝi publikigis tri verkojn de Kalocsay: Rimportretoj, Lingvo Stilo Formo kaj Streĉita kordo.

Rimportretoj “vekis la naturan scivolemon de nia publiko”[3] pri verkistoj kiel Kabe, Baghy aŭ Nekrasov. Lingvo Stilo Formo pristudis vortfaradon, ritmojn, rimojn kaj antaŭvenis la Parnasan Gvidlibron.

Tamen, en longega recenzo Ludoviko Totsche (Lajos Tárkony) atentigas nin pri la tria Kaloĉaja verko, Streĉita kordo (titolo kiun oni trovas en la Zamenhofa traduko de Marta de Orzeszko). Laŭ Tárkony, “okazis io ankoraŭ ne ekzistanta en nia lingvo kaj literaturo, okazis io nova: poemlibro, kiu meritas, ke oni lernu Esperanton nur por povi ĝin legi, poemlibro, kiu pridonacis nin per kristale evoluinta poezia lingvo; poemlibro, kies apero apertas novan horizonton por nia literaturo: la epoko de l’ diletantismo definitive dronis en la pasinton”.

Kaj kompreneble la tri verkoj plene “apertis”, aŭ malfermis, la pordon al la “eterna neologisma diskuto”[4]. La diskuton (foje preskaŭ kverelon) oni legas en numero post numero de Literatura Mondo. Baghy (“Ĉu Ido aŭ Poliglot? Ne! Desperanto”) primokis la poezian fakvortaron de la Parnasa Gvidlibro de Kalocsay kaj Waringhien, kaj lasis la revuon al Kolomano kiel nura ĉefredaktoro. Kalocsay senlace defendis la poezian vortprovizon, sed li ankaŭ senlace korektis (kaj tio vekis protestojn) kaj finfine ĉiam “donis legende kaj leginde riĉan revuon”[5]. Denove, li verkas poemojn, tradukas (Dante, Goethe, Kariny, Hugo, Leopardi...), recenzas (kaj eĉ respondas al recenzoj

de siaj verkoj!), diskutas ĝissate pri neologismoj, ktp. Iam, vualita sub la kaŝnomo Kopar, la plurvizaĝa Kalocsay eĉ cerbumis la mezepokan Esperanton, aŭ ĉu estis C.E.R. Bumy kiu elpensis ĝin?

Post la dua mondmilito kaj la tria vivo de Literatura Mondo (1946–1949), Kalocsay kunlaboris en La Nica Literatura Revuo (1955–1962) ĉefredaktita de Waringhien, tiu Georgo Peterido Peneter "filo" de Peter Peneter, la alteregoo de Kalocsay, kiu jam en 1932 verkis la erotikajn Sekretajn Sonetojn. Sur la paĝoj de NLR, Kalocsay denove pristudis la klasikan metrikon en Esperanto.

Kiel gramatikisto, Kalocsay verkis kun Waringhien Plenan Gramatikon (1935), opiniis pri la plej tiklaj problemoj (ata-ita, ci, po) kaj estis ĉiam en la centro de la neologisma diskuto.

Li forpasis la 27an februaro 1976, "nun vortoj jam ne helpas, kaj larmoj ne sufiĉas"[6].

#### Notoj

1. *Hungara Vivo*, 1972, №4, p. 4–5.
2. *Asonanco* // *Literatura Mondo*, 1922, №1, p. 20.
3. *Totsche L. K. Kalocsay: Streĉita kordo* // *Literatura Mondo*, 1932, №1, p. 14.
4. *Titolo de la verketo de H. Mayer: La eterna neologisma diskuto: Kalocsay kaj la sekvo*, Vieno, 1987.


5. *Szilágyi F. Zigzage en lamujo, II* // *La Nica Literatura Revuo*, 1961, №6, p. 213.

6. *Rossetti R. Je la morto de kara amiko* // *Heroldo de Esperanto*, 1977, №15.

Javier Guerrero

Ĉi tiu artikolo aperis en la marta kajero de La Ondo de Esperanto (2012).

Fonto: <http://sezonoj.ru/2012/03/209trezoro/>



#### Hajkoj de Elena Popova

#### Poemoj



La nova legantino de nia revueto estas verkistino **Elena Popova** el Bulgarujo. Ŝi verkis bulgarlingve kaj en Esperanto multe da libroj, inter kiuj 10 por infanoj. En Esperanto estas eldonitaj la jenaj: **Ansereto vojaĝanto** (2006,2008-Brajle), **Rim-enigmoj** (2009,Kava-Pech,Chehio), **Renkontoj dumvoje** (Fonto,Brazilo,2015). En 2016 estas eldonita ŝia lasta dulingva libro: **La sezonoj de la animo-hajkoj** (Matador,Bulgarujo). Ĉi jare ŝi havas jubileon. Ni deziras sukceson al ŝi kaj dankas ŝin por la permeso prezenti vin kelkaj el ŝiaj hajkoj.

**Hajkoj** estas tradicia japana lirika poezio, ekzota floro en la kampo de la arta kulturo, kiu malfacile kreskas en aliaj landoj. Ĝi estas produkto de alia mondrigardo kaj defio por la artisto. Kontraste la malavara poezia esprimo en la okcidento, la japanaj poetoj kapablas nur en tri mallongaj linioj de 5-7-5 silaboj kapti la momenton kaj transdoni la senton. Jen hajkoj de **Elena Popova** pri "Vintro" el ŝia libro "**La sezonoj de la animo**".

Knabin' en blanko  
dancas inter la steloj.  
Vintro. Vivaldi.



Paser' sur branĉo.  
Sube – malsata kato.  
Du vanaj revoj.



Sub la neĝa zorg'  
vivo elkreskas. Nigra  
vento malicas.

Glacio. Sur ĝi –  
neĝo. Banana ŝelo.  
Kaj... surdorse hom' .



La neĝa homo  
al la luno parolas :  
–Oni min amas !...



Ĝardeno. Vintre  
ĉiam kun blanka ĉapel' .  
Blanka espero.

Neĝa ventego.  
Taso da tili-teo –  
vintra odoro.



La homo sen am'  
similas al la vintro –  
ĉiam malvarma.



Paser' malsata  
rigardas al mia kor'  
por paneretoj.






**La juna tribestro (tradukis Saĝad Daŝti Neĵad)**

lun tagon indianoj demandis la novan tribestron: “Ĉu la venonta vintro estos malvarmega?”

La juna tribestro, kiu havis nenian sperton, respondis: “Por certiĝi pri nia sekureco dum la vintro, kolektu brullignojn.” Kaj poste li telefonis la veteroficejon kaj demandis: “Ĉu la venonta vintro estos malvarmega?” Kaj la respondanto respondis: “Verŝajne jes.”

Do, la juna tribestro ordonis al la tribanoj plu kolekti brullignojn kaj por certiĝi denove telefonis la veteroficejon kaj jene demandis: “Ĉu vi ankoraŭ konfirmas vian antaŭvidon?” kaj la respondanto respondis: “Certe”.

Kaj la tribestro ordonis al la tribanoj ke ili kolektu tiom



**Kruĉvort-enigmo**

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1								■				
2		■										■
3					■						■	
4						■						■
5							■			■		
6	■		■					■				
7		■					■			■		
8		■			■						■	
9		■		■					■			
10		■			■			■				
11			■			■			■		■	
12										■		

**Horizontale**

1. Fortega vento, de grado 12 en la Boforta skalo; Tiu tempopeco, kiu pasas dum unu plena rotacio de Tero ĉirkaŭ sia akso
2. Malgranda homfigura puĉo, kun moveblaj membroj movataj per fadenoj aŭ risortoj
3. Tro ŝparem' pri io; Vasta etendaĵo da sala akvo. kiu kovras la plej grandan parton de la terglobo, ofte

brullignojn, kiom ili povas kaj denove telefonis la veteroficejon kaj demandis: “Ĉu vi certas ke la venonta vintro estos malvarmega?” Kaj la respondanto respondis tiel ĉi: “La plej malvarma vintro dum la jarcento”, la tribestro demandis: “Kial vi tiel ĉi certas?” kaj la respondanto respondis: “Ĉar indianoj terure kolektas brullignojn.”

**Fonto: revuo Umuĵo, junio 2016 n-ro 1**

La instruisto al la knaboj:

- Kiu el vi sentas sin stulta, ekstaru!
- Neniu leviĝas. La instruisto insistas:
- Mi scias, ke inter vi estas stultuloj. Ili ekstaru!
- Leviĝas nur Peĉjo
- Ho Peĉjo, ĉu vi konsideras vin stulta?
- Tute ne, mi nur kompatis vin, kiu estis la sola staranta.

- kontraste kun la seka tero aŭ la sensala akvo
4. Apartenanta al nur unu speco, prezentanta nur unu karakteron; Kvantumo de vibrado en krado.
  5. Filo de Jehudo, kiu interrompis koiton, por ne gravedigi sian bofratinon, kaj pro tio estis mortigita de Javeo; Nomo de la 24a grafemo de la E-a alfabeto; Instrumento
  6. Pezo de ĉia entenantaĵo (kesto, sako, botelo ktp), en kiu estas enpakita ia varo aŭ kemiaĵo; Natria hidroksido, NaOH, tre grava kemiaĵo uzata en preskaŭ ĉiuj branĉoj de la kemia industrio
  7. Rinito; Nedifina adjektivo signifanta «de tute ne difinita speco, kun tute nedifinitaj ecoj»; Prepozicio montranta direkton aŭ celon de ia movo aŭ fizika ago
  8. Nedifina pronomo reprezentanta iun objekton, aferon, ideon; Ordinara, laŭregula stato, ĝenerale rekonata kiel modelo
  9. Rivero, enfluanta en la Baltan maron (14°36'E, 53°36'N); Mamul' el la ordo de ronĝuloj, parencaj al la musoj, sed pli grandaj kaj kun tre longa vosto
  10. Sufikso esprimanta pasivon por ankoraŭ ne okazinta procezo; Sufikso esprimanta ĝenerale agon kaj uzata por formi verbojn el morfemoj signifantaj agon aŭ objekton, por prezenti la agon en ĝia

malvolviĝo kaj insisti pri ĝia daŭro aŭ ripetiĝo; Fabela estaĵo de malsupera rango, dotita per supernaturaj povoj

11. Nedifina adjektivo signifanta «de tute ne difinita speco, kun tute nedifinitaj ecoj»; Prepozicio (uzebila ankaŭ kun infinitivo), esprimanta ĝenerale la celon kaj pli precize montranta tion, al kio estas destinita aŭ adaptita io aŭ iu.

12. Parto de la metafiziko, studanta la problemojn pri la esto ĝenerale, sendepende de ĝiaj ŝanĝaspektoj, kaj pri ĝia unua kaŭzo.

### Vertikale

1. Planedo, la sepa ekde Suno, inter Saturno kaj Neptuno, kun 17 satelitoj; Skeleto de la kapo de la vertebruloj, entenanta kaj ŝirmanta la cerbon, kaj plejofte konsistanta el ostosubstanco.

2. Ekstera aŭ interna difekto de la organismo; Suf. Signifanta membron de grupo

3. Maldolĉa por la gusto aŭ la koro; Speco de orizo, tropika, unujara, pli-malpli marĉa herbo

4. Rimedo, kiu gardas kontraŭ maloportunaĵo; La nedifinebla, nepersona principo, imanenta en la universo kaj ĝin movanta, karakterizata de la alterno de jino kaj jango

5. Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj

aŭ objektoj, formantaj unu tuton; Izola lok', verda kaj kvazaŭinsula meze en la dezerto, kaj kovrita de vegetaĵoj pro ekzisto de fontoj

6. Pronomo signifanta mi kaj vi; lo reliefe ronda

7. Religia movado japandevena, celanta la unuigon de la homaro kaj uzanta E-on; Regula, oportuna dismet' de objektoj en ilia ĝusta loko

8. Homo kaj pli ĝenerale vivulo, kies staturato estas nenormale malgranda; Unu movo en ia direkto

9. La solida, firma supraĵo, kiu portas homojn, bestojn kaj konstruaĵojn; Havant' ĉiujn ecojn similajn al tiuj de io alia; Prepozicio signifanta: «en egalaj partoj, konsistantaj el», kaj uzata por montri, ke la kvanto aŭ mezuro esprimata de la numeralo aŭ vorto esprimanta kvanton, ne rilatas unufoje al ĉiuj objektoj aŭ personoj kune rigardataj, sed ja rilatas ripete kaj sinsekve al ĉiu el ili aparte

10. Manko de tonio aŭ forto de histoj kaj organoj; Knabo, kies gepatroj, aŭ nur unu el ili, mortis

11. Nomo de la oka grafemo de la E-a alfabeto; Maljuna; Spirebla nesimpla gaso, kiu ĉirkaŭas Teron

12. Globeto ĝenerale kalkita (pli malofte aragonita, hematita k.a.), proks. granda kiel fiŝovo (ĝenerale 0,2—0,5mm diametra, malofte pli), formiĝinta ĉirkaŭ minerala aŭ organika ero

(La solvo troviĝas en la lasta paĝo)

## Doĝrudan Metod ile Esperanto

## Stano Marĉek



Antaŭ nelonge aperis turka versio de la lernolibro Esperanto per rekta metodo – ankaŭ sur disko – la libro en pdf kaj modela elparolo en mp3. La tradukon faris Vasil Vasil Kadifeli, provlegis kaj korektis Murat Ozdizdar.

konfirmis mian supozon, ke la plej efika vojo por instrui fremdan lingvon estas la tiel nomata „rekta metodo“, do la metodo, per kiu niaj gepatroj instruis al ni la gepatran lingvon :-). Instrui pensi en la lingvo, ne traduki!




Vidu pli ĉe

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9154> , resp.

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9155> .

Ni iom retrorigardu kiel ekestis la projekto.



Ankoraŭ en mia junaĝo mi decidis gvidi kursojn de Esperanto. Neniu el la trovitaj lernolibroj de Esperanto (en tiama Ĉeĥoslovakio) ŝajnis al mi konvena. Pro tio mi decidis kompili propran materialon.

Por fari tion kiel eble plej bone, mi komencis studi psikologion de fremdlingva instruado kaj metodikon de Esperanto-instruado. Tio

Mia 22-leciona, riĉe ilustrita lernolibro (la bildojn desegnis mia filino Linda) baziĝas sur rekta, tiel nomata indukta metodo: konkludi el konkretaj faktoj ĝeneralan leĝon, laŭ kiu la lernantoj – helpe de bildoj kaj analogio – subkonscie ricevas la klarigojn de la novaj elementoj kaj poste – en tekstoj kaj ekzercoj – reenkonsentas kaj ekzercas ilin ĝis alproprigo. En lecionoj, kie la akirita vortprovizo permesas klarigi novan vorton per la jam konataj, aperas en la paĝgranda bildvortaro klarigo en Esperanto.

Post la rektmetoda leciono venas (en la naciaj eldonoj) la sekcio Gramatiko, en kiu nacilingvaj klarigoj firmigas la jam intuicie komprenitan materialon (indukta metodo).

La lernolibro unue aperis en la slovaka lingvo. Ĉar mi gvidis kursojn de Esperanto ankaŭ eksterlande, sekvis internacia eldono de la lernolibro, sen nacilingvaj klarigoj (pura rekta metodo).

Foje vizitis min mia pola amiko Stašek Mandrak, kiu proponis traduki la lernolibron al la pola. Mi tradukis por li ĉiujn nacilingvajn tekstojn en Esperanton, kaj li sekve tradukis la tekstojn al la pola, post kio naskiĝis la pola eldono. Tio inspiris ankaŭ alilandajn instruistojn traduki la lernolibron al siaj lingvoj. Ĝis nun la lernolibro aperis jam en 38 lingvoj, kaj estas tradukata al pliaj.

La lernolibra vortprovizo respektas la oficialan ofteliston (Baza Radikaro Oficiala, Aktoj de la Akademio II), kiun Akademio de Esperanto rekomendas por ĉiuj lernolibroj de Esperanto. Ĝi ĉerpas 750 pleje uzatajn vortelementojn (morfemojn) – komence la plej ofte uzatajn ktp – kaj garantias, ke la lernanto unue lernu la plej ofte uzatajn kaj pleje bezonatajn vortelementojn, por povi interkompreniĝi en plej oftaj situacioj de la ĉiutaga vivo. Ankaŭ la gramatikaj elementoj estis anticipite dividitaj laŭ sia graveco, kaj en la libro ili aperas en tiu vicordo. La unuopaj gramatikaj eroj estas alproprigataj en apartaj „paŝoj“ kaj klarigataj per indukta metodo. Surbaze de la jam posedataj konoj, helpe de ilustraĵoj, simboloj, analogio kaj kunteksto, la lernanto komprenas la novan elementon subkonscie, intuicie. Ĉiu „paŝo“ prezentas la novan elementon en diversaj situacioj kaj tipaj uzoj.

La komprenon de la leksikaj elementoj helpas la kontinua bildvortaro, la paĝgrandaj filmstrieccaj desegnaĵoj, en kies kadroj aperas la ilustraĵoj de la entekste per ciferoj markitaj leksikaj aŭ gramatikaj eroj, kaj sekve, fine de ĉiu leciono, aperas subteksta vortareto – nacilingvaj tradukoj de la novaj vortoj (se la lernanto tamen ne bone komprenis iun nocion). Fine de la lernolibro aperas dulingva vortaro. Ĉiu vorto havas indekson, etan ciferon, kiu montras, en kiu leciono la vorto aperis la unuan fojon.

La lernolibro prilaboras la plej gravajn prepoziciojn kaj afiksojn, la problemon de -ig-, -iĝ-, participojn kaj refleksivon, kaj multajn ĉiutagajn paroltemojn, kiel familio, aĉetumado, homa korpo (eĉ dufoje), tagordo, naturo, sezonoj-tempoj, kalendaro ktp. La tekstoj estas priskribaj, monologaj, kaj inter la didaktikcelaj materialoj legeblas ankaŭ proverboj, kelkaj fabeloj kaj literaturajoj.

La ekzercoj legigas, skribigas, respondigas kaj atentigas pri parkerigindaĵoj. Utila parto estas la librofina parto „La ĉiutaga Esperanto“, en kiu troveblas laŭtemaj listoj de plej oftaj parolturnoj de la lingvo. Kvankam ene de la libro ne troveblas informoj pri la movado, antaŭ la ferma enhavtabelo la lernolibro donas liston de Esperantaj asocioj kaj kluboj, kaj de kelkaj (inter-)naciaj retejoj.

La lernolibrojn akompanas komuna didaktika materialo: 500 Instruaj Bildoj por rektmetoda instruado por la instruistoj (kartonaj folioj A5 en du praktikaj kofretoj, kiuj paŝo-post-paŝo sekvas la lernolibron; ankaŭ sur KD, por projekcii la bildojn al ekrano), KD Modela elparolo en mp3 + la koncerna lernolibro en pdf (voĉlegitaj Esperantaj tekstoj de la libro kaj projekciebla / printebla lernolibro en la koncerna lingvo).

La lernolibro ĝis nun aperis en 38 lingvoj: la angla, franca, itala, rusa, ĉina, japana, korea, portugala, pola, slovaka, Esperanta, greka, nederlanda, irlandia, rumana, germana, dana, litova, serba, vjetnama, luksemburga, hungara, kroata, finna, ĉeĥa, hispana, ukraina, sveda, tajvana, armena, taja, norvega, islanda, indonezia, turka, hinda, bulgara kaj latina (ankaŭ sur diskoj en pdf kun modela elparolo en mp3).

## ESPERANTO PER REKTA METODO

Riĉe ilustrita lernolibro de Esperanto por komencantoj de Stano Marček, taĝa por kursoj kaj memlernantoj. Ĝis nun ĝi aperis en 36 lingvoj: la angla, franca, itala, rusa, ĉina, japana, korea, portugala, pola, slovaka, Esperanta, greka, nederlanda, irlandia, rumana, germana, dana, litova, serba, vjetnama, luksemburga, hungara, kroata, finna, ĉeĥa, hispana, ukraina, sveda, tajvana, armena, taja, norvega, islanda, indonezia, turka kaj hinda.

La lernolibrojn akompanas komuna didaktika materialo: 500 Instruaj Bildoj por rektmetoda instruado (kartonaj folioj A5, kiuj paŝo-post-paŝo sekvas la lernolibron; ankaŭ sur KD) kaj KD Modela elparolo en mp3 + la lernolibro en diversaj lingvoj en pdf (voĉlegitaj Esperantaj tekstoj de la libro kaj projekciebla / printebla lernolibro).  
Pliaj informoj kaj mendoj ĉe: [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com).




Por legantoj de Turka Stelo la lernolibroj mendeblas kun triona rabato (la lernolibro 5 eŭroj, la disko 10 eŭroj) ĉe la aŭtoro: [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com), resp. ĉe la UEA-libroservo:

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?titolo=&auxtoro=Stano+Mar%C4%8Dek&katego=&kondicho=chio&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo>

La internacia versio de la kurso ekzistas jam ankaŭ kiel aplikaĵo por telefonoj, vidu:

<http://www.iei.nl/ieieo77.htm>





Muso kun zibelo loĝis en la domo de malriĉa viro. Iun tagon, unu el la amikoj de tiu viro malsaniĝis kaj la kuracisto diris, ke li devas manĝi elŝeligitajn sezamajn grajnoj. Do la malsanulo donis iom da sezamaj grajnoj al la malriĉulo, por ke li elŝeligu ilin kaj la malriĉulo donis ilin al sia edzino por elŝeligi. Post kiam la virino elŝeligis ilin, la zibelo, vidante ilin, venis al ili kaj forportis iomete da grajnoj al sia hejmo; ĝi intencis, poste reveni kaj kunporti pli da grajnoj. La virino rimarkis la mankon de iom da grajnoj. Do ŝi sidis kaj ekgardis la grajnoj por ke ŝi komprenu la kialon de tiu manko. Poste la zibelo revenis por forporti la grajnoj kaj vidis, ke la virino sidas tie; ĉar ĝi komprenis, ke ŝi sidas por gardi, do la zibelo diris al si mem:

“La fino de tiu ĉi afero ne estas bona, mi devas fari ion por kaŝi mian malbonan agon.”

Do ĝi reportis la grajnoj, kiuj estis en sia hejmo, al la antaŭa loko. La virino vidante ĝin diris al si: “Tiu ĉi zibelo ne kaŭzis la mankon de grajnoj, ĉar iu alia ŝtelis la grajnoj kaj tiu ĉi reportis ilin. Tiu ĉi agis bone, do mi ne ĝenos ĝin. Sed mi devas daŭrigi la gardon por koni la ŝteliston.”

La zibelo komprenis la penson de la virino, do iris al la

muso kaj diris al ĝi: “Ho kara fratino, por agi laŭ amik-maniero, ĉiu devas respekti najbaron.”

La muso respondis: “Jes, ho fratino, prave, sed kio estas la celo de tiu ĉi diro?”

Kaj la zibelo diris: “La posedanto de la domo alportis grajnoj kaj kun sia edzino manĝis ilin kaj jam ili estas sataj kaj ankoraŭ restas sezamaj grajnoj. Ĉiuj bestoj iom manĝis, do vi ankaŭ meritas manĝi iom da ili.”

La muso gajigis kaj ekdancis kaj movis sian voston. Ĝi pro sia avideco trompiĝis, eliris el sia hejmo kaj vidante elŝeligitajn grajnoj, kiuj brilis kiel suno, ne konsideris la sekvon de sia ago. Ĝi iris inter la grajnoj kaj volis manĝi kaj tiam subite la virino per bastono frapis kaj mortigis ĝin. Ĝia avideco kaj senatenteco kaŭzis ĝian morton.

Tradukis Saĝad Daŝti Neĵad

El la libro "Mil kaj unu noktoj" laŭ persa traduko fare de Abdu'l-Latif Tasvaĝi Tabrizi

Fonto: revuo Umujo aŭgusto 2016 n-ro:2  
<https://drive.google.com/drive/folders/0BwWhyDWcKt2VdWw5aTZ1b0Y4dGc>

Vortareto		reporti	tekstar taşımak	gaj-iĝi	sevinmek (kendisi)
		kaŭzi	sebep olmak	ekdanci	dans etmeye
zibelo	samur	manko	eksiklik		başlamak
elŝeligita	kabuĝu soyulmuş	ŝteli	çalmak	avideco	açgözlülük
sezamo	susam	amik-maniero	arkadaş tavrı	tromp-iĝi kanmak (kendisi)	
grajno	tahıl tanesi	respekti	saygı duymak	konsideri	hesap etmek,
vidante	görerekten	najbaro	komşu		düşünmek
forporti	alıp götürmek	prave	çok doğru	subite	aniden
ekgardi	gözetmeye	celo	amaç	mort-igi	öldürmek
	başlamak	posedanto	sahip		(başkasını)
kaŝi	saklamak	sata	tok	senatenteco	dikkatsizlik
ago	aksiyon, emel	meriti	hak etmek		





**Saluton,**

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun Nikolo Makiavelo.

**Vasil Kadifeli**

### La vulpo kaj leono : Nikolo Makiavelo



Supozu ke vi estas la reganto de iu urbo-ŝtato en la 16-a jarcento ie en Italujo eble en Florenco aŭ Napolo. Vi havas la tutan povon, ĉar vi povas malliberigi kiujn ajn vi volas, kaj havas en via dispono armeon. Tamen estas ĉirkaŭaj urbo-ŝtatoj kiuj atendas taŭgan tempon por ataki vin kaj

konkeri vian urbo-ŝtaton. Do, kiel vi devas regi? Ĉu honeste, kompateme kaj afable kontraŭ via popolo aŭ tute alie?

Nikolo Makiavelo (1469-1527) pensis, ke regi per tiu maniero ŝajnus bona, tamen eble tiu ne estus bona ideo. Li pensis ke de tempo al tempo mensogi, ne plenumi viajn promesojn, kaj mortigi viajn malamikojn estus pli bone por vi. Por iu princo plenumi siajn promesojn estas facila afero, tamen por, ke li estu efika princo, li devas lerni kiel esti malbonulo. La plej grava afero estas resti en regpovo kaj ppr tio preskaŭ ĉiuj vojoj estas decaj. Li ĉiujn siajn pensojn eksplikis en sia libro "La Princo" kiu estis eldonita en la jaro 1523 kaj fariĝis la libro kun la plej malbona reputacio ĝis nun. Kelkaj eĉ oni nomis tiun libron diabla, sed aliaj la plej konsista libro kiu eksplikas kio okazas en politiko.

Nuntempaj politikistoj certe legis ĉi tiun libron, tamen neniu konfesas tion. "La Princo" estis destinita al la nova Princo kaj ne al iu ajn. Makiavelo kreskis apud Florenco kaj en sia juneco fariĝis diplomato, do li konatiĝis kun kelkaj reĝoj, imperiestroj kaj la papo. Li estis tre impresita de Cezaro Borgio la eksterleĝa filo de papo Aleksandro la 6-a. Borgio estis estro kiu per mensogoj kaj trompoj mortigis ĉiujn siajn malamikojn. Laŭ Makiavelo, Borgio faris ĉion ĝustan sed en la fino li malvenkis pro sia malbona sorto.

Kiam la familio de Mediĉoj kiu regis Florencon antaŭ Borgio revenis al povo malliberigis Makiavelon pro ke li planis renversi ilin. Li estis multe toturita

tamen li sukcesis elteni ĉion kaj konfesis nenion, do finfine li estis liberigita kaj forpelita kvankam multaj el siaj kolegoj estis mortigitaj en ĉi tiu periodo. Li ne povis reveni Florencon, kaj loĝante en kamparo li pensis sin diskutante kun princoj kaj reĝoj. En tiu tempo li verkis la libro "La Princo". Eble lia celo estis trovi laboron kaj fariĝi politikisto denove sed tio ne okazis kaj li fariĝis nur verkisto. Li verkis kelkajn aliajn similajn librojn kaj li ankaŭ verkis tetraĵojn, ekzemple "La Mandragoro" estas ankoraŭ enscenigita kiel teatraĵo kaj tradukita al Esperanto.

Makiavelo plejparte kredis je la bona sorto. Laŭ Makiavelo nia sukceso dependas duone al bona sorto kaj duone al kio ni faras ĝuste. Se ni estas rapida kaj kuraĝa nia probablo pri sukceso altigos. Rivero povas flui savaĝe sed se ni konstruas akvobaraĵojn kaj ŝirmejojn kontraŭ inundoj dumtempe ni estos sekuraj.

Makiavelo instruis siajn lernantojn per ekzemploj:

- Kiel Borgio trompis la familio Orsini, embuskigis kaj mortigis ĉiujn gvidantojn. Makiavelo kredis ke tiu estis bona virto.

- Kiel Borgio donis la estradon de la regiono Romagna al sia generalo Remirro de Orco kiu estis senkompata estro kaj per premo regis la regionon. Tamen poste kiam la aferoj en la regiono trankviliĝis li mortigis Remirron, distrancis lian korpon kaj pendigis ĝin en du apartaj lokoj en la centro de la urbo. Makiavelo ankaŭ apogis tiun hororan konduton ĉar ĝi estis bona virto por princo.

Makiavelo fakte ne apogis mortigon sed ĉi tiuj ekzemploj estis tiuj, kiujn Borgio devus fari por sukcesi. Laŭ Makiavelo ili estis metodoj kiuj malebligis pluajn sangoverŝadon, ĉar alie la popolo de Romagna regiono ribelus kontraŭ Borgio. Pli grava estis la rezultoj kaj ne la metodoj. Se Borgio estus kompatema tiam, tiu kostus por li kaj la ŝtato. Estas bona ke la popolo timas kaj amas sian gvidanton sed tio ne estas facila afero. Se vi preferas ke la popolo amas vin tiam, dum la malbona tempo ili povas forlasi kaj perfidi vin. Sed, se la popolo timas vin, ili ne perfidos vin. Fakte la pesimisma flanko de Makiavelo malestimis la naturon de la homo. Do li instruis ke oni ĉiam regu kun ambaŭ la homaj kaj la bestaj sovaĝaj ecojn.

**La vulpo estas ruza kaj atentema pri embuskoj, sed Leono estas forta kaj timiga.**

Nur per kompatemo kaj justeco oni ne povas resti en povo. Do jen la difino en PIV-o :

**Makiavelismo:** *Politika aŭ socia agmaniero, bazita sur*

*la malrekono de ĉia moralo, sistema uzo de trompado k strebado al la propra avantaĝo.*


Hitlero mensogis al Ĉamberlano kaj trompis lin, sed se Makiavelo estis vivanta eble li avertus lin. Makiavelo apogis severajn agojn kontraŭ la

malamikoj. Eĉ en la tiama Italujo kie, ĉie estis verŝo de sango homoj estis konfuzitaj pri lia instruado. Devas esti limoj en tiaj severaj agoj, alie ĉie diktatoroj aperos. Sed Makiavelo pensis ke li estis realisto kiu komprenis ke la popolo estas ĉefe egoisma.

**(daŭrigota)**

## Malnovaj grekaj mitoj : Edipo kaj Antigona (parto 1/2)

### EDIPO KAJ ANTIGONA



En Tebo iam regis reĝo Laio kaj reĝino Jokasta. Ili ne havis infanojn. Ili deziris sopire havi filon, kiu transprenu iam la potencon, sed ili sopiris vane.

Tial la reĝo sendis heroldon al Delfo por pridemandi la faman orakolon, kiel oni povus mildigi la koleron de la dioj. La heroldo revenis kun terura profetaĵo, kiu prenis la spiron de la reĝo: „Vi ricevos filon, sed kun li iros sub vian tegmenton la malfeliĉo. Vi mortos per mano de via filo!“

Ŝokite raportis la reĝo al sia edzino la orakolan diron. La reĝino ploris dum kelkaj noktoj, turmentate de malicaj divenoj. Post certa tempo naskis Jokasta filon. En la palaco regis terurigo anstataŭ ĝojo. Reĝo Laio eĉ ne volis vidi la infanon. Li vokis al si maljunan paŝtiston, kiu portu la bebon en la sovaĝajn montojn kaj tie demetu ĝin, por ke la rabobestoj voru ĝin. Sed la paŝtisto kompatis la senkulpan infanon. Li ne demetis ĝin en la montoj, sed portis ĝin al longjara konato, al alia paŝtisto, kiu paŝtadis la gregojn de la reĝo de Korintio. Poste li revenis al Tebo kaj kondukis tiel, kvazaŭ li zorgeme estus plenuminta la ordonon de la reĝo Laio.

Laio trankviligis kaj post kelkaj monatoj sekigis ankaŭ la ploroj de la reĝino; ŝi forgesis la teruran orakolon kaj sian kompatindan filon. La reĝa paro kutimiĝis al tio, ke ĝi ne havos sekvonton sur la trono.

La paŝtisto de la korinta reĝo nomis la knabeton Edipo kaj prenis lin kun si al Korinto. Ankaŭ la reĝo de tiu lando estis sen infanoj. La infano sur la brakoj de la paŝtisto plaĉis al li. Li prenis ĝin al si kaj plenkreskigis ĝin kvazaŭ ĝi estus la propra. Edipo fariĝis granda kaj forta kaj ne sciis, kiuj estas liaj efektivaj gepatroj. Ĉiuj kaŝis ĉe li, ke alportis lin paŝtisto el la montoj.

Kiam Edipo estis plenkreskinta, aranĝis lia nutropatro grandan festenon en la palaco. La bona vino varmigis la vangojn kaj la pensojn de la gajaj bankedistoj. Oni rakontis pri tio, kio okazis kaj kio ne okazis, kaj la tre sangvinaj gastoj ekkverelis. Ankaŭ Edipo estis temperamentoplena ulo kaj miksiĝis en la disputon. Kverelema gasto volis ofendi Edipon kaj vokis: „Naŭzas min kvereli kun vi. La dioj scias, kies filo vi estas, certe ne la filo de nia reĝo!“

Edipo bridis sian koleron kaj silentis. Stranga penso prenis de li la trankvilon. Je la sekva mateno li vizitis la reĝan paron kaj demandis ilin, ĉu tio estas vera, kion li aŭdis. Ili trankviligis lin kaj insultis la ebrian babilaĉulon. Edipo ridetis nur malgaje kaj ne fidis iliajn vortojn. La suspekto ne lasis pacon al li. Sen la scio de sia nutropatro li survojiĝis al Delfo. Li esperis, ke la orakolo diros la veron al li. Sed li foiris el Delfo pli konfuzita ol li iris tien. La orakolo profetis teruran estontecon al li: „Fuĝu de la patro! Se vi lin renkontos, rapide trafos lin la morto per unu el viaj manoj kaj vi edzigos la propran patrinon.“

Edipo decidis eviti la urbon, en kiu vivas liaj nutrogepatroj, kiujn li konsideris siaj veraj gepatroj. Li turniĝis al la mala direkto, tramigris nekonatajn landojn kaj direktiĝis laŭ la steloj por ne esti subite kondukita en la hejman regionon. Li timis, ke en Korinto la orakolo povus plenumiĝi.

lutage li renkontis sur malvasta vojo ĉaron, sur kiu



veturis iu maljunulo kaj du servistoj. Ili volis rapide preterveturi lin kaj vokis al Edipo: „For el nia vojo!“ Edipo ne moviĝis flanken kaj komencis kolere kvereli kun la veturigisto. En la kverelo li puŝis la gvidiston de la ĉaro. La maljunulo sur la ĉaro furioziĝis kaj batis Edipon per sia bastono sur la kapon. Kolerigite Edipo mortbatis la maljunulon kaj ankaŭ la servistojn. Tiel li mildigis sian koleron kaj migris plu.

Baldaŭ li staris antaŭ la muroj de Tebo. Laca li sidiĝis sur ŝtonon kaj ripozis. Tiumomente montriĝis ĉe vojkurbiĝo migranto, kiu forkuris el Tebo. Antaŭ Edipo li haltis kaj vokis: „Kiu vi estas, ke vi tiel kviete sidas? Eĉ ne al mia malamiko mi konsilus ripozi en tiu regiono.“

Edipo rigardis la migranton mirigite.

„Unu ripozas kaj alia kure furiozas kvazaŭ li estus farinta ion malbonan“, diris Edipo. „Vi forkuras de Tebo kaj mi celas tien.“

„Al Tebo, ĉu?!“ vokis la migranto terurigite. „Ĉu vi ne scias, ke sur roko de Tebo sidas Sfinkso?“

„Mi venas el Delfo“, diris Edipo, „kaj survoje mi parolis kun neni.“

„Aŭskultu do“, flustris timeme la migranto, „Sfinkso estas estaĵo kun ina kapo kaj la korpo de leono. Surdorse ĝi havas flugilojn. Ĉiutage devas iri ano de Tebo al la roko kaj Sfinkso diras al li enigmon, kiun li devas solvi. Se li ne trovas la solvon, ĝi ĵetas la urbanon en la abismon. Neniu povas solvi la enigmon, estas ŝajne fia sorĉo. Mi ja eĉ bonŝancias, ĉar mi ne estas ano de Tebo. Kiam mi venis en la urbon kaj aŭdis pri tiu plago, mi tuj forkuris. Ankaŭ vi ne estas tebano, ne iru en la urbon, iru kun mi, ni forkuru ambaŭ.“

„Kuru“, diris Edipo, „la vivo por vi ŝajne havas grandan valoron, ke vi volas konservi ĝin tiel gardeme kontraŭ ĉio, kio povus endanĝerigi ĝin. Sed male, se perdos la vivon mi, mi evitos nur la plenumon de malica orakolo.“

Edipo leviĝis kaj paŝis lante kaj pripenseme renkonte al Tebo. La migranto skuis pro li la kapon: „Li ne estas ano de Tebo kaj tamen miksiĝas en aferojn de Tebo. La dioj favoru lin.“ Kaj li forkuris por kiel eble plej rapide lasi la urbon malantaŭ si.

Edipo iris en Tebo rekte al la reĝa palaco. Tie li trovis la reĝinon Jokasta kaj ŝian fraton Kreono.

Reĝo Laio vojaĝis al Delfo por pridemandi la orakolon kiel la urbo povas liberigi sin de Sfinkso. Sed li ne revenis. Oni diris, ke survoje rabistoj atakis kaj mortbatis lin. Anstataŭ la morta reĝo ekregis Kreono. Edipo paŝis antaŭ la reganton.

„Mi scias pri la plago, kiu la urbon suferigas“, li diris, „mi volas iri al Sfinkso kaj provi solvi ĝian enigmon.“

Kreono kaj Jokasta admiris la kuraĝon de Edipo. Malgaje diris Kreono: „La dioj helpas al la kuraĝuloj. Sfinkso mortigis mian filon kaj mortigos ĉiun el ni, se ne venos iu, kiu solvos ĝian enigmon. Kaj mi volonte translasos la regadon al tiu, kiu sukcesos venki Sfinkson.“

Jokasta vidis plena de admiro la agopretajn vizaĝtraĵojn de Edipo kaj ne sciis, ke ŝi rigardas sian propran filon.

La loĝantoj de Tebo akompanis Edipon al unu el la sep pordegoj de la urbo. Sed plu iri ili ne kuraĝis.

Edipo grimpis sur la kruta pado supren sur la rokon, sur kiu sidas Sfinkso. Ĝi atendis jam sian sekvan viktimon. Ĝi kunpinĉis la okulojn kaj observis Edipon kun malestima rigardo.

„Aŭskultu bone“, sonis el la homa gorĝo nehome dura voĉo:

„Ĝi havas kapon,  
kvar gambojn matene,  
tagmeze nur du  
kaj tri gambojn vespere.  
Ju pli da gamboj ĝi uzas,  
des malpli da forto havas ĝi.“

Edipo ridetis. Li estis prudenta kaj la enigmo ŝajnis facila por li. „Jen la homo“, li diris, „matene de la vivo la homo rampas kvazaŭ li estus kvarpieda. Tagmeze de sia vivo la homo paŝas rekte sur du gamboj kaj kiam la vespero de l' vivo venas, li prenas lambastonon kiel helpilon. Jen la tria gambo.“

„Vi solvis la enigmon!“ kriaĉis Sfinkso kaj ĵetiĝis de la roko en la abismon.

Kiam la anoj de Tebo de la urba remparo subite vidis,

ke Edipo revenas vivanta kaj sana, ili ekjubilis. Ili festis sian liberiganton, kaj Kreono transdonis al li la tronon. Tiel Edipo fariĝis reganto de Tebo kaj edzinigis la reĝinon Jokasta.

Dum longa tempo Edipo en sia regno regis juste kaj feliĉe. La reĝino naskis du filojn al li, Eteoklon kaj Polinikon kaj du filinojn, Antigona kaj Ismena. Neniu divenis, ke la infanoj de Edipo samtempe estas liaj gefratoj.

Kelkaj jaroj pasis, la knaboj fariĝis viroj kaj la knabinoj inoj. Ĝis finfine venis la jaro de la malfeliĉo, en kiu la pesto disvastiĝis en la reĝolando Tebo. La pestmorto furiozis en la loĝejoj de Tebo, ĝi neniigis tutajn familiojn kaj senlima timo okupis tiujn, kiuj ankoraŭ povis esperi transvivon. Ankaŭ la gregojn sur la paŝtejoj preskaŭ neniigis la pestatako. La paŝtistoj mortis kaj la gregoj preskaŭ formortis. Sur la paŝtejoj, kie iam resonis la muĝado de la brutaroj, estis nun silento kaj morto.

La timskuataj civitanoj iris al Edipo kaj petis lin, ke li forprenu la pereon de iliaj sojloj kaj gregoj. Ili estis konvinkitaj, ke venkinto kontraŭ Sfinkso troviĝas sub la protekto de la senmortaj dioj.

Edipo konsolis ilin: „Iru senafliktite en viajn loĝejojn. Ankoraŭ hodiaŭ revenos bofrato Kreono el Delfo kun la diro de la orakolo. Ni aŭskultos la ordonojn de la dioj kaj forpelos la peston el nia lando.“

Antaŭ ol la tago pasis, haltis antaŭ la palaco ĉaro kun ŝaŭmkovritaj ĉevaloj. Kreono elsaltis kaj rapidis kun la orakola diro al Edipo. „La orakolo ne promesas rapidan kaj facilan helpon al ni“, li sciigis al la reĝo, ke la murdisto de reĝo Laio laŭdire ankoraŭ vivas en nia urbo, ke la pesto nur tiukaze retiriĝos, se la kulpanto estos punita.

Edipo tuj en la tuta regno sciigis, ke ĉiu, kiu scias ion pri la murdo de reĝo Laio, tuj venu en la reĝan palacon kaj atestu tion. Li ankaŭ vokigis la blindan Tiresion, al kiu la dioj donis la kapablon de la divenado. Tiresion li devis vokigi plurfoje. La profeto rifuzis veni. Fine knabo kondukis lin al la palaco. Sed Tiresio paŝis tien nur heziteme kaj haltis antaŭ la palaco.

Edipo kuris renkonte al li: „Kunvenu en la palacon, li urĝis in, „ni atendas vian saĝan konsilon.“

„Permesu al mi foriri, reĝo“, Tiresio petis, „se mi ne nomos la kulpanton al vi, tio estos por ni ambaŭ pli bona. Kelkfoje estas pli bone ne scii ol scii.“

„Parolu do“, instigis lin Edipo, „estas neniu inter ni, kiu ne volus savi Tebon de la perejo. Vi ne rajtas elturniĝi. Rigardu, la tuta popolo deziras, ke vi parolu.“

„Ne devigu min, reĝo. Prefere permesu al mi silenti“, respondis Tiresio, „terura plago trafis nian patrimon, sed pli granda malbono trafus vin, se mi parolus.“

„Bone“, objetis Edipo, „ estas jam klare al mi, kial vi ne volas paroli. Ĉu vi eble estas eĉ kunulo de tiuj rabistoj, kiuj murdis la reĝon? Vi estas perfidulo de la lando, kaj se vi ne estus blinda, mi dirus, ke vi mem estas la murdisto!“

Post tiu insulto Tiresio ne pli longe silentis kaj perfidis tion, kion li sciis jam delonge: „Vi volas scii la veron, ĉu? Mi diros ĝin al vi. Ne serĉu la murdiston, ĉar vi mem estas la murdisto. Vi murdis reĝon Laio kaj edzinigis la propran patrimon!“

Edipo ekteruriĝis. Li rememoris pri la malnova profetaĵo. Sed la kolero forpelis la maltrankviligan memoron.

„Kiu elpensis tion?“ li kriis, „ĉu vi, ĉu Kreono? Ĉu vi volas ŝtelire akiri minan tronon per ruzo kaj trompo? Aŭ ĉu vi estas freneza?“

„Por vi mi ŝajne estas freneza“, respondis Tiresio, „sed viaj gepatroj rigardis min kiel saĝulon. La tempo montros, kiu pravis, kaj kiu ne volis kompreni.“

Post tiuj vortoj la blinda oldulo forlasis la palacon.

Reĝino Jokasta konsolis la kolerigitan Edipon: „Kial gravu, kion diras Tiresio, ne afliktiĝu pro tio. Mi volas diri al vi ekzemplon, kiel la orakolo povas erari. Ankaŭ mia unua edzo, Laio, iam pridemandis la orakolon kaj ricevis kiel respondon, ke li mortos fare de mano de sia filo. Kaj poste mortis nia ununura filo en la montara soleco kaj Laion murdis rabistoj malproksime de la vojkrucuro sur la strato al Delfo.“

„Proksime de la vojkrucuro, ĉu?“ demandis Edipo ekscitite. „Diru al mi rapide, kiel aspektis Laio?“

„Li estis altstatura“, respondis Jokasta, „je la tempioj li estis jam griza kaj liaj trajtoj similis al viaj.“

„Tiresio pravis!“ kriis Edipo terurigite kaj demandis kaj demandis kaj ju pli li eksciis, des pli kaptis lin malespero kaj gorĝopremis lin. La onidiro, laŭ kiu rabistoj murdis Laion, solviĝis en nebulon kiel vaporo kaj restis la terura supozo, ke Edipo mem estis la rabisto.

Tradukis Donjo & Cezar laŭ la ĉeĥa originalo „Staré řecké báje a pověsti“ de la eldonejo ALBATROS en Prago

Korektis Vladimir Türk

(daŭrigota) **Fonto:** <http://www.ipernity.com/blog/cezar/4621556>

## Kuiru kun mi

### PANO HEJME FARITA

*Hodiaŭ ni kuiru la manĝon plej simplan kaj plej malnovan en la mondo: la panon!*



#### Ingrediencoj (1 kg da pano)

- 300 ml da akvo
- 250 gr da faruno el mola tritiko
- 250 gr da faruno #00
- 50 gr da supervirga oleo
- 12 gr biergisto (aŭ 3,5 g dehidratigita gisto)
- 8 gr da salo
- 1 kulereto da malto (aŭ da sukero)

Ni solvu la biergiston en varma akvo kun kulereto da malto (aŭ da sukero). Ni kribru en bovlo (aŭ sur laborebeno) la farunon el mola tritiko kaj la farunon #00, ni kreu truon en la centro kaj verŝu ene la miksaĵon. Ni solvu la salon en iom da akvo kaj aldonu la oleon. Verŝu sur la faruno, miksante kun larĝaj kaj rapidaj movadoj. Ni knedu ĉiun, dum ĉirkaŭ dek minutoj, ĝis ni obtenas glatan kaj elastan paston kaj ni donu la formon de pilko aŭ plilongigitan formon laŭ la tipo de pano kiu vi volas fari. Ni metu en farunumita bovlo, ni kovru kaj lasu gisti dum ĉirkaŭ du horoj en la fermita kaj estingita forno (kun la lumigita lumo). Kiam la pasto duobliĝas en volumo, ni metu ĝin ĉe la centro de graskolekta pleto kovrata kun bakadpapero kaj lasu



gisti por alia horo en la fermita forno. Ni metu sur la fundo de la forno malgrandan ujon kun la akvo, por eviti la sekiĝon de la pasto. Poste kiam la pasto duobliĝos en volumo denove kaj estos preta: ni faru kun tranĉilo kvar profundajn tranĉojn sur la surfaco de la pasto de ĉirkaŭ 1 cm kaj ni metu en la forno varmigita al 200 gradoj, proksimume por 45-50 minutoj. Kiam la pano estis orkolora ni elfornigu ĝin.

Jen nia hejme farita pano !

**Fonto:** <https://kuirukunmi.com/2014/09/12/pano-heime-farita/>

Vortareto		gлата	kaygan	pilko	top
		graskolekta pleto	ızgaralı tava	profunda	derin
bakadpapero	pişirme kağıdı		kabı	sekiĝo	kuruma
biergisto	bira mayası	knedi	yoğurmak	supervirga oleo	sızma zeytinyağı
dehidratigita gisto	kuru maya	kribri	elemek	surfaco	yüzey
	dışarı çıkartmak	laborebeno	çalışma tezgahı	tranĉilo	bıçak
duobliĝi	iki katına çıkmak	malto	malt	tranĉo	kesik
elasta	elastik	miksaĵo	karışım	ujo	kap
elfornigi	fırından	obteni	elde etmek	verŝi	dökmek
farunumita bovlo	hamur yapma	pasto	hamur	volumo	hacim



## EL UNUA PARTO - TAŬO



10

Ĉu vi povas formi vian animon tiel,  
ke ĝi ĉirkaŭprenas la unuecan sen disiĝo?  
Ĉu vi povas unuecigi vian forton  
kaj atingi softecon tian,  
ke vi fariĝas tia, kia infaneto?  
Ĉu vi povas purigi vian sekretan rigardadon tiel,  
ke ĝi fariĝas sen makuloj?  
Ĉu vi povas ami la homojn kaj administri la ŝtaton  
tiel,  
ke vi restas sen scio?  
Ĉu vi povas, kiam malfermiĝas la pordoj de Ĉielo,  
esti kiel kokino?  
Ĉu vi povas trapenetri per via interna klareco ĉion  
sen bezoni la agadon?  
Naski kaj nutri,  
naski kaj ne posedi,  
efiki kaj ne reteni,  
pliigi kaj ne regi:  
jen sekreta VIVO.

### Rimarkoj de Cezar

"Kokino" tradukis Wang Chongfang per "Femalo", do per "Ino", kaj "sekreta VIVO" per "profunda VIRTO". La ĉapitra traduko de Vilhelmo tre malsimilas al tiu de Wang Chongfang.

### Rimarkoj de Wang Chongfang

La Libro de Laŭzi estas dividita en du partojn: Dao Jing (Klasikaĵon pri la Taŭo) kaj De Jing (Klasikaĵon pri la Virto). Kion do la Virto signifas en la libro?

En la ĉina lingvo la origina signifo de la vorto De estas "akiri", kaj poste, per sencoplivastigo, ĝi ricevis ankaŭ la signifon "virto". Laŭ ĉinaj antikvaj filozofoj, la propeco de ĉiu

ekzistaĵo estas akirita el la origino de la mondo. En la filozofio de Laŭzi la Taŭo signifas la originon de la universo kaj la universalan principon, kaj la Virto nature signifas la econ de la konkreta estaĵo akiritan el la Taŭo. Kiel la aktiveco aŭ la funkcio de la Taŭo, la Virto troviĝas en ĉiuj estaĵoj kaj estas la latentaj povoj, kiu povas transformi, kiel ekzemple, la semon en arbon kun neniam peno de la flanko de la semo. La Virto do estas ankaŭ la manifestiĝo de la nevidebla Taŭo en la homaj aktivecoj kaj en la homa vivo, kaj estas konsiderata kiel la rimedo ebliganta al homoj atingi la Taŭon. Konkrete dirite, la Virto estas la Taŭo manifestiĝanta en la homaj kondutreguloj. Se oni sekvas tiujn regulojn, oni tiam vivas en harmonio kun la Taŭo, t.e. kun la fortoj de la naturo, kiuj ĉiaokaze estas nerezisteblaj. La rilato inter la Taŭo kaj la Virto estas kvaza. tiu inter korpo kaj ĝia funkcio. La Taŭo aludas naturan staton sen ajna signo de homa interveno, dum la Virto aludas la revenon al la natura stato kun homaj aktivecoj inkluzivitaj. Alivorte, kiam la metafizika Taŭo estas aplikata al la homa socia vivo, ĝiaj manifestiĝantaj katakterizaĵoj spertataj kaj sekvataj de la homoj estas rigardataj en la amplekso de la Virto. Laŭ "La Libro de Laŭzi", la Virto, aŭ la Taŭo, manifestiĝas ĉefe en:

- 1) la sekvado de la leĝoj de la naturo kaj de la principo de "senagado";
- 2) la malplenigo de sia menso kaj la kvietigo de sia koro;
- 3) la penado resti mola kaj malforta kaj fari nenian konkuradon.

### Rimarko de Cezar

Por kompreni, kial Laocio malŝatas en la tuta verko tiom la sciadon, oni devas scii, ke Laocio faras ĉiam diferencon inter intuicia kaj diskursiva scioj. Kaj mi persone supozas, ke li jam pensis pri tio, ke la oficiala scio utilas kutime unuavice al la regantoj. Ankaŭ la agado de Laocio laŭ mia opinio celas pli la oficialan kaj rutinan agadojn ol la individuan.

(daŭrigota)

Aŭskultu Radiojn "Varsovia Vento", "CRI online", "Pola re Radio" ktp





### Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi

açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

### LA PORKOJ

La du grandaj arboj en la ĝardeno de Sinjoro Muso estas kverkoj.

Glanoj kreskas sur kverkoj.

En la aŭtuno la glanoj falas al la tero.

Musoj ŝatas glanojn!

Porkoj ankaŭ ŝatas glanojn!

"Miaj infanoj," ofte diris la patra muso, "Ni devas ĉiam fermi la pordon de la ĝardeno. Ni havas multajn glanojn, kaj porkoj multe ŝatas glanojn. Eble la porkoj venos en nian ĝardenon por manĝi niajn glanojn. Ni devas ĉiam fermi la pordon. Ĉiam! Ĉiam!"

Unu vesperon,<sup>1</sup> kiam Johano iris al la lito, li forĝesis fermi la pordon de la ĝardeno!

En la mezo de la nokto, du grandaj porkoj, kun tri porkidoj, eniris la ĝardenon.

Baldaŭ ili vidis la glanojn sur la tero sub la kverkoj.

"Ho, ho," diris la patra porko, "Tie estas multaj belaj glanoj. Venu, miaj karaj infanoj! Venu, mia kara edz-ino!<sup>2</sup> Manĝu! Manĝu!"

Tiam la kvin porkoj manĝis ĉiujn glanojn. Restis eĉ ne unu!

La proksiman matenon, kiam Sinjoro Muso vek-iĝ-is, li malfermis la fenestron, kaj el-rigardis.

Kion li vidis?

Kvin porkoj en la ĝardeno!

Jes! Sinjoro Porko kaj Sinjorino Porko, kun siaj tri porkidoj, estas sub la kverkoj.

Sinjor Muso vestis sin rapide.

Li sur-metis sian pantalonon kaj sian veston.

Tiam li prenis grandan bastonon, kaj iris en la ĝardenon.

Sed kiam li malfermis la pordon de la domo, la gepatroj<sup>3</sup> kaj la tri porkidoj jam kuris rapide el la ĝardeno sur la strat-on.

Sinjoro Muso kuris al la arboj.

Kion li vidis? Neniom da glanoj!

"Ho johano," diris la patro, "vi estas tre malbona museto! Vi forgesis fermi la pordon de la ĝardeno, kaj la porkoj venis dum la nokto, kaj manĝis ĉiujn niajn glanojn. Restas eĉ ne unu!"

Tiam Johano komencis plori.

"Ho, mi bedaŭras! Mi bedaŭras!" li diris.

Lia patro donis al li poŝ-tukon.

"Ne ploru! Ne ploru, mia filo," li diris. "Ni havas panon kaj buteron; teon, lakton kaj kafon. Ni havas ankaŭ pomojn, pirojn kaj prunojn; terpomojn kaj brasikojn. Ni havas jam sufiĉe. Ne ploru!"

-----  
<sup>1</sup> Kiam la suno sub-iris, tiam estas vespero. Kiam ĝi lev-iĝis, tiam estas mateno.


<sup>2</sup> La patro estas edzo de la patrino.

<sup>3</sup> Patro kaj patrino estas "ge-patroj".

## Sözlük

aŭtuno	sonbahar	glano	palamut (meşe)
baldaŭ	yakında	kafo	kahve
bedaŭr-as	üzülüyor (fiilin mastar şekli: bedaŭr-i)	kara	değerli, sevgili
brasiko	lahana	kion	neyi?
ĉiam	her zaman	komencis	başladı (fiilin mastar şekli: komenc--i)
ĉiu	her biri	kreskas	büyüyor (fiilin mastar şekli: kresk-i)
ĉiuj	hepsi	kverko	meşe (ağacı)
ĉiujn	hepsini	lev-iĝis	kalktı, yükseldi (kendisi)
eĉ	bile (bir tane bile kalmadı)	mateno	sabah
edz-ino	eş, karı	mezo	orta
edzo	eş, koca	neniom	hiç bir miktar
el-rigardi	dışarıya bakmak	ofte	sıklıkla
falas	düşüyor (fiilin mastar şekli falı)	piro	armut
fenestro	pencere	plori	ağlamak
ge-patroj	ana-baba = ebeveynler	porkido	domuz yavrusu
		porko	domuz
		poŝ-tuko	mendil





Esperanto'da fiiller her dilde olduğu gibi geçişli ve geçişsiz diye ikiye ayrılırlar. Geçişliler bir Nesne'yi yani (-n) eki alan bir direk objeyi, geçişsizler ise Özneyi etkilerler.

Geşili fiiller -iĝ eki ile geçişsiz, geçişsiz fiiller -ig eki ile geçişli forma çevrilirler.

Karakteri fiil değil de, isim veya sıfat olan köklerden fiil üretirken her iki durumda da bu köklerin kullanılmasına özen gösterilmesi gerekir. Ör. "bel-" kökü sıfat karakterlidir, bundan "bel-igi" güzelleştirmek, "bel-iĝi" güzelleşmek fiilleri elde edilebilir. "bel-i" fiili ise kökün anlamını yerine getiren bir fiil formudur, bunun anlam "güzel olmak"tır. Ör."vi belas" "güzelsin" anlamına gelir. Aynısı isim karakterli kökler için de geçerlidir.

Dili doğru kullanmak için köklerin karakterini ve fiillerin orijinal formunun geçişli mi geçişsiz mi olduklarını bilmek gerekir. Web'deki PIV sözlüğü bu konuda çok yardımcı olur.

proksima	yakında olan, sonraki	surmet-i)
pruno	erik	teo
restis	kaldı (filin mastar şekli: rest-i) (5 tane palamut kaldı)	tero
si	kendisi	terpomo
sin	kendisini	vek-iĝ-is
strato	sokak	vespero
straton	sokaĝa, sokaĝı	vestis
sub-iris	alta gitmek, batmak	giydirdi (başkasını) (filin mastar şekli: vest-i) (vestis sin = kendisini giydirdi)
sufiĉe	yeterince	
sur-metis	üzerine giydi (filin mastar şekli:)	

#### Ekler:

- ge-** Kelimeye her iki cins birden anlamını verir (paro/patrino=baba/anne, gepatroj= ebeveynler)
- ig** Geçişsiz olan bir fiili geçişli hale getirir (dormi -> dormigi = uyumak > uyutmak)
- iĝ** Geçişli olan bir fiili geçişsiz hale getirir (vek-i -> vekigi = uyandırmak > uyanmak)

## Kapanış



Bir başka sayımızın da sonuna geldik. Selamlama kısmında size bahsettiğimiz yazıları okuyabildiyseniz ne mutlu bizlere.

Bu sayımızda da kolaydan zora bir çok yazı aktardık sizlere. Bir kaçının ekine sözlük ilave ettik okumanızı kolaylaştırmak için. En azından bu yazıları okumaya çalışın, bu çabanız dilinizi geliştirmek için sizlere yardımcı olacaktır.

Bu sayımızdaki başka bir kaç önemli yazı da aşağıdakiler::

- "La Junaj Detektivoj" çok basit bir macera hikayesi okumaya çalışın, eski kısımlarını okumadıysanız eğer, dergimizin eski sayıları zaten aşağıdaki bağlantıdan indirilebiliyor:

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revuetto/>

- Esperanto dünyasının önemli bir şairi ve yazarı olan Kalman Kalocsay'ın 6 Ekim doğum günü vesilesi ile yazılmış yazı yazar hakkında sizlere bir fikir veriyor.

- Fıkralar bir dili öğrenmek için önemli basit yazılardandır, okumadan geçmeyin. Bulmacalar da aynen öyle, ancak bulmacalar az daha ileri seviyede olanlar içi içindir. Bulmacaları biz kendimiz

hazırladığımızdan o kadar da zor olmamaları lazım. Unutmayın bulmacaları PIV sözlüğünden yararlanarak hazırlıyoruz, dolayısı ile PIV'i kullanmayı da öğrenin:

<http://vortaro.net/>

- Stano Marček ünlü 35'ten fazla dile çevrilen eğitim kitabının yazarı. Kitabın Türkçe dilinde de yayınlanmış olmasından dolayı sizlere bu kitabı neden yazdığını anlatmak için bir kez daha kalemi eline alıp yazdı.

- Oedipus ve Antigone çok uzun bir tercüme olduğundan bunu iki kısımda vermeyi tercih ettik. Aslında hikayeleri ikiye bölmek hiç güzel bir şey değil ancak bir derginin beşte birini bir hikayeye ayırmak da mümkün değil.

- Yemek tarifleri her zaman bir dili daha kolay öğrenmek için basit kısa yazılardır, atlamayın.

- Elbette en sondaki Dil Kursumuzun da üzerinden geçmeden dergiyi bir kenara bırakmayın. Bu kurs size farklı bir açıdan Esperanto dilini bir kez daha öğretecektir.

**Sonraki sayımızda buluşmak üzere...**



"Se ni ne rakontas ke Esperanto ekzistas, ĝi vere ne plu ekzistos. La estonto de nia bela kajefika internacia lingvo dependas de ĉiu esperantisto. Pro tio ni devas ĝin diskonigi multe pli..."



*Solvo de la kruĉvort-enigmo*

K	O		O	I	G	O	L	O	T	N	O	12
	R	O	P			J		A		A		11
O	E	F		D	A		T	O				10
T	A	R		O	R	O	D	O		Z		9
I		O	M	R	O	N		O	I			8
A	L		A	I		O	Z	I	R	O	K	7
O	D	O	S		O	R	A	T		D		6
O	L		I		O	T		N	A	N	O	5
		O	N	O	N	O	F		A	R	U	4
		O	R	A	M				A	R	V	3
		O	R	A	R	I	O	N	E	T	O	2
O			T	A	G	O		N	A	G	A	1
12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1	